

Bulgara **ESPERANTISTO**



7-8

1972

Petko Arnaudov. Nia sukcesplena 38-a kongreso	1
* * * Telegramoj de la Kongreso al CK de BKP, la Na- cia Konsilantaro de Patrolanda Fronto, la Ministro de de Popola Instruado, Vjetnama Pacdefenda Komitato	7-9
Kunĉo Vălev. Internacia mitingo de la paco	9
* * * Telegramo de la Mitingo al la Prezidento de Usono	10
Konstantin Gusev. Kavaliro	12
Sofiano. Bulgara-Germana vespero pri Georgi Dimitrov	12
B. Mitovski. Junulara esperantista renkontiĝo en Trojan- balkano	13
Ivan Milenkov. Mitingo de la paco	13
Emil Ĉirpanski. Oratora konkurso de „Fajrero“ — Dospat	14
* * * Bulgaraj esperantistoj en Weimar	15
S. Neilande. Seminario pri Georgi Dimitrov en Litovio	15
Enjo Daskalov. Renkontiĝo de tri generacioj	15
Cvjatko Todorov. Karaj gastoj el frata Debrecen	16
Irina Dimitrova, Veselin Dimitrov. Sukcesaj Esperantaj kursoj en Pomorie kaj Mezdra	16
J. Gold. Renkontiĝo en Leningrado	17
Vladislav Viršila. Jubileas kretlinganoj	17
Valentin Ĉembarisov. Interurba renkontiĝo de sovetaj espe- rantistoj	18
Nano Nanov. Konferenco egala al kongreso (pri la Dua na- cia konferenco de la Esperantistoj en (GDR)	18
Prodan Prodanov. „Les pauvres bulgares“	19
Veselin Hanĉev. Romanco pri Jose Sancha, la pentristo. Tra- dukis Ivan Dobrev	21
Asen Grigorov. Unua de Majo	22
Mihail Ŝekerĝiev. La printempo	22
Mladen Isaev. Komunistoj. Tradukis Tempesto	24
Simeon M. Simeonov. Turisto-esperantisto	24
Elisaveta Bagrjana. Morgaŭna tago	25
Orlin Orlinov. Diskutado pri la poezio	25
Stojan Kostadinov. Arbidejo	26
Ĥristo Jasenov. (Donu helpo) Tradukis Violin Oljanov	28
Damjan Damjanov. Nefinita simfonio. Tradukis Nikola Pilev	28
Dao Anh Kha. Al mia „Sankta Maria“	29
Adiaŭa	29
Nguyen Hai Trung. Ĥristo Botev	30
Ho vi, betulo!	31
Ivan Draganov. En la arbaro	31
* * * Deziras korespondi	1V

Sur la kovrilpaĝo:

Antaŭ la kongresejo de la 38 Kongreso de BEA. Parto de la kongresanoj.

*Abonkotizo: iara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 4,28 lv., 5 rubloj, 2,50 dola-
roj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Ru-
manio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta nu-
mero — 0,14 lv.*

*Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²: sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco
Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Sep-
tembrie 65, Bukuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika,
D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Mos-
kva V-449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**NIA SUKCESPLENA 38-A KONGRESO**

La 2-a de julio — bela, sunplena tago. Sur la serpentumanta al Smoljan ŝoseo ne unu-du, kiel ordinare, sed aro da aŭtobusoj, plenplenaj de homoj, kiuj jen entuziasme kantas, jen laŭte ridas kaj parolas. Al Kongreso! Al la 38-a! Al Smoljan — nia verda kongresurbo, situanta en la sinoj de la ĉarma Rodopi-montaro!

Sed kiu diris, ke la Kongreso komenciĝas je la 3-a? Jen: jam hodiaŭ, la 2-an de julio, okazas sufiĉe impona aranĝo — literatura legado, manifestaĵo de la verkokreaĵoj de nia movado! Ĝi estas dediĉita al la glora 90-a naskiĝtago de nia senmorta gvidanto kaj instruanto Georgi Dimitrov. Unu post alia sur la podion aperas niaj verkemuloj, kelkaj el ili jam famaj inter la esperantistoj ne nur en nia lando. Niaj poetoj kaj verkistoj persone legas siajn verkojn, ĉu originalajn, ĉu tradukajn: Asen Grigorov, Ivan Draganov, Stojan Ĝuĝev, Toma Ajolov, Veselka Ivanova, Minail Ĉobanov, Dimitr Mitrev, Stefan Pavlov, Violin Oljanov, Zora Mladenova Hans, Jordan Angelov k. a. Partoprenas la programon per legado

de siaj originalaj verkoj ankaŭ niaj karegaj gastoj el batalanta Vjetnamio Dao Anh Kha kaj Nguyen Hai Trung — konataj Esperanto-poetoj. Plenumas verkojn Vera Vâjarova (rakonton de Nevena Nedelĉeva), Kunĉo Vâlev (tradukon de Tempesto), Hristo Kurumilev (fragmenton el la konkluda parolado de Georgi Dimitrov antaŭ la faŝista tribunalo en Leipzig). Plezurigas la ĉeestantojn per grekaj kantoj Eva Bojaĝieva (de ŝi tradukitaj Esperanten), ankaŭ la violono de Plamen Vodeničarov. Kia bona komenco! Ĝi devas fariĝi tradicia. En la kadro de ĉiu estonta E-kongreso nepre devas okazi manifestaĵo de la kreaĵfortoj de nia Movado, de nia Lingvo.

La 3-a de julio. La Sporta Palaco en Smoljan estas plen-plena: pli ol 1100 bulgaraj esperantistoj — delegitoj kaj gastoj de la Kongreso. Krome: 25 reprezentantoj el 10 aliaj landoj: USSR, Francio, Nederlando, Vjetnamio, Hungario, Anglio, Pollando, Jugoslavio, GDR, Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ reprezentanto de UEA — Bela Berceli, komitatano de UEA.

K-do Nikola Aleksiev, la prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, solene proklamas la Kongreson malfermita. Ekregas unuminuta silento — la kongresanoj manifestas sian estimon al la forpasintaj membroj de CK de BEA Argir Andonov el Burgas kaj d-ro Zahari Boĉev el u. Dve Mogili.



En la prezidantaro okupas lokojn la oficialaj gastoj: la kandidatmembro de CK de BKP kaj unua sekretario de la DK de BKP en Smoljan *Dinir Ĉolakov*, la reprezentanto de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto *Ivan Rajkov*, reprezentantoj de la Nacia Pacdefenda Komitato — *Ivan Belĉev*, la Ministerio de Popola Instruado — *Nikola Makariev*, la Unuiĝo de Bulgaraj Filatelistoj — *Donĉo Stanĉev*, la prezidanto de la Distrikta Popola Soveto en Smoljan *Veliĉko Karaĝov* k. a.

Honorlokojn en la prezidantaro okupas ankaŭ meritaj E-veteranoj: *Zora Mladenova* *Hans* el Varna, *Ivan Vasilev* el Pazarĝik, *Asen Grigorov*, *Meleŝko Ŝiŝkov* kaj *Nano Nanov* el Sofio, *Petr Pamporov* el Smoljan. Ĉi tie estas ankaŭ la gvidantoj de la eksterlandaj delegitaroj, la membroj de la Estraro de CK de BEA k. a.

La Kongreso aprobis la proponitan tagordon kaj la laborkomisionojn — mandata, por statutŝanĝoj, por la rezolucio, por la elekto de nova CK, por telegramoj kaj sekretariaton de la Kongreso.

K-do *Nikola Aleksiev* legis la raporton de CK pri la ĝisnuna agado. K-do *Hristo Kanev* legis la raporton de la

Centra Kontrola Komisiono.

Komenciĝis la salutparoladoj kaj la diskutoj.

Profundan impreson faris la salutvortoj de k-do *Dimitr Ĉolakov*, kiu substrekiis la pozitivan rolon de Esperanto en la nuna mondo kaj alte taksis la kontribuon de la bulgaraj esperantistoj por popularigo de nia lando, por firmigo de kunlaborado kaj kompreniĝo inter la popoloj. Aparte menciindaj estas la salutparoloj de la sovetaj kaj vjetnamaj gastoj, kamaradoj *Magomet Isaev* kaj *Dao Anh Kha*. La entuziasmo kreskis nemezureble, kiam k-do *Kha* transdonis al la prezidanto de BEA standardon el batalanta Vjetnamio... En la kongresejo longe sonis vĝlaj aplaŭdoj kaj sloganoj pri eterna amikeco kaj kunlaborado, pri venko de la brava vjetnama popolo super la usonaj agresuloj kaj ties saĝonaj papoj, pri paco en la tuta mondo.

Ankoraŭ vibris en la aero la lastaj vortoj de k-do *Ivan Rajkov*: „La Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto alte taksas vian internacian agadon, per kiu vi kontribuas por klarigo de la paca politiko de la bulgara registaro“ — kiam eniris granda grupo de junpioniroj kun floroj enmane, vestitaj en



rodopaj popolkostumoj. Ili salutis la Kongreson en Esperanto. Neforgesebla kortuŝa momento!

Post la unua kunsido, tagmeze, la kongresanoj metis florkronojn antaŭ la monumentojn de la pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo elstaraj smoljanaj esperantistoj Bratan Ŝukerov — komandinto de partizana taĉmento, kaj Kiril Maĝarov — poeto. Posttagmeze la kunsido komenciĝis per saluto de la reprezentanto de la Nacia Pacdefenda Komitato k-do *Ivan Belĉev*, kiu substrekis, ke la bulgaraj esperantistoj estas frunta taĉmento kaj nedisigebla parto de la pacbatalaj fortoj de nia popolo. Li parolis ankaŭ pri la intimaj rilatoj ekzistantaj inter BEA kaj la Nacia Pacdefenda Komitato.


Salutis la Kongreson kaj raportis pri la agado de la distrikta E-organizaĵo en Ĥaskovo k-do *Georgi Idakiev*. Inter alie li diris: „Dum la lastaj kvar jaroj la DK de BEA en Ĥaskovo stabiligis sian agadon kaj ĉiuj societoj de la distrikto serĉas ĝian helpon. Ni estis dommastroj de la IX-a Junulara Esperanto-Festivalo kaj aktive partoprenis la festivalon en Jambol. Dum nia lasta konferenco ni ŝanĝis la nomon de E-societo „Amikeco“ en Dimitrovgrad per la nomo

„Georgi Dimitrov“ memore al la heroo de Leĥpzig, kies nomo portas ankaŭ la urbo mem.“

Drumi Mateev el Razgrad: „Ni kongresas en distrikto, kie estas la naskiĝloko de la popola heroo Diĉo Petrov—estro de la soldata partizana bataliono „Ĥristo Botev“. Mi havis la feliĉon koni lin persone... Ni donacas al la muzeo de Diĉo Petrov en Smoljan albumon entenantan 10 fotojn pri li.“

Kun varmaj aplaŭdoj estis renkontitaj la salutvortoj de k-do *Nikola Markariev* el la Ministerio de Popola Instruado: „...Estas donita ebleco por fakultativa kaj stud-ronda lernado de Esperanto fare de la gelernantoj, kaj estas garantiitaj kondiĉoj, ke la instruistoj, ĉu en kursoj, ĉu per memstara sinokupo, akiru sciencajn kaj metodikajn spertojn por instrui Esperanton en la lernejoj... Esperanto estas lingvo internacia. Ĝi proksimigas kaj fratigas la homojn, servas al la afero de la paco kaj progreso...“

Enjo Daskalov el Vraca raportis pri 100% abonigo al „Bulgara Esperantisto“ en la lernantaj E-societoj en Vraca (pli ol 400 abonoj) kaj pri pluaj aliaj iniciatoj kaj sukcesoj. Li aten-



tigis pri la ega neceso plibonigi kaj modernigi la metodikan flankon de la Esperanto-instruado, kaj faris dekon da proponoj kaj rekomendoj por plia ĝenerala plibonigo de nia Esperanto-laboro.

Genčo Genčev el Sofio — prezidanto de la Sekcio de Juristoj-Esperantistoj: „La historio montras, ke komence ĉiujn grandajn kaj noblajn ideojn oni akceptis kun malfido. Tamen pri Esperanto ni jam povas kuraĝe diri, ke forpasis senrevne la tempo, kiam oni renkontadis ĝin per ironiaj ridetoj kaj primokoj. Nun, kiam Esperanto aktive kontribuas por la triumfo de la nobla kaj progresema ideo pri homa interkompreniĝo, kiam ĝi estas efika ilo por paco, internacia kunlaboro kaj kulturo, hazardaj moko kaj ironioj manifestus nur malklerecon kaj barbarismon.“

Plue *Genčev* rakontis pri la agado de la nova Sekcio de Juristoj-Esperantistoj, kiu dum la lastaj du jaroj notinde aktivis. Ĝi jam estas akceptita kiel sekcio de l' Asocio de la Bulgaraj Juristoj. En ĝi membras multaj profesoroj, juĝistoj, prokuroroj, jurkonsilistoj kaj advokatoj. Havante antaŭvide la gravan rolon de la juristoj en la socia vivo, oni bone devas kompreni la rolon de Esperanto sur tiu kampo.


En tiu senco emocie parolis ankaŭ *Bojčo Mladenov* el Vraca, farante kom-

paron, kiel oni akceptis la ideojn de la fervojoj, la akcepton de la 8-hora labortago, la triumfon de la presarto, aŭtomobilo ktp. Li finis per la vortoj: „Hodiaŭ ankoraŭ estas homoj, kiuj ne rekonas Esperanton, tamen ĝi ankaŭ venkos.“

Pri la aktuala neceso altiri la junularon al nia Movado parolis *Violin Oljanov* el Sofio; pri granda organiza stabiligo parolis *Georgi Dolapčiev* el Sofio; pri intima kunagado kun neesperantistaj organizaĵoj rakontis *Hristo Manolov* el Polski Trâmbeŝ kaj *Atanas Bojaĝiev* el Ŝumen, prezentante siajn bonegajn spertojn; pri la E-laboro inter la instruistoj kaj en la lernejoj parolis *Vasil Bozarov* — prezidanto de la Instruista Sekcio. Li substrekis la ekskluzive gravan rolon de la esperantistoj-instruistoj en nia Movado. *Bozarov* sciigis, ke ĉiujare dum la lastaj lernojaroj Esperanto en nia lando estas instruata en 90—100 lernejoj al po ĉirkaŭ 2500 lernantoj. Li rakontis pri la senlaca agado de la Instruista Sekcio de BEA kune kun la Sofia Distrikta E-Komitato organizi preparadon de novaj Esperanto-instruistoj el inter profesiaj instruistoj. Tiurilate li montris kiel ege gravan kaj aktualan iniciaton la forestajn (korespondajn) porinstruistajn kursojn dum la lastaj lernojaroj (en 1970/1971 kun 246 partoprenintoj, en 1971/72 — kun 230; entute por 4 jaroj, ekde kiam la kursoj funkcias —

583 partoprenintoj) kaj la 20-tagajn somerajn ĉeestajn kursojn (ĝis nun ilin partoprenis pli ol 300 geinstruistoj). Tiuj, kiuj sukcece faris la necesan ekzamenon en tiuj kursoj, jam ricevis ŝtatan diplomon por instrurajto de Esperanto. Ni devas plene utiligi la bonan komprenon kaj favoran rilaton de la Ministe-

Dao Anh Kha kaj Nguyen Hai Trung prezentas la salutstandardon.



rio de Popola Instruado al nia afero.

Pri diversaj flankoj de nia E-agado parolis ankaŭ la delegitoj *Georgi Kaŝukeev* el Kjustendil, *Simeon Baltaĝiev* el Bjala (distrikto de Ruse), *Ŝterjo Kuŝev* el Peŝtera, *Kosta Konstantinov* el Pazarĝik, *Georgi Dobrev* el Ruse, *Kalju Bjandov* el Burgas, *Jordan Angelov* el v. Ĉeŝnegirovo (distr. de Plovdiv), *Bojidar Leonov* el Karlovo. Ili emfazis la sukcesojn, sed ankaŭ tuŝis iujn mankojn kaj malperfektaĵojn en nia E-laboro, strebante eltiri bonan lecionon el la faritaj eraroj. Ili dividis spertojn pri valoraj iniciatoj kaj faris utilajn proponojn por plibonigo de nia E-agado.

La Kongreson salutis *Dončo Stanĉev* el la Asocio de la Bulgaraj Filatelistoj. Li esprimis esperon, ke ankaŭ estonte la du asocioj daŭrigos sian kunlaboradon, kaj invitis la kongresanojn viziti la filatelan ekspozicion, aranĝitan lige kun la Kongreso.

Varmajn salutojn kaj fratajn bondezidojn direktis al la Kongreso kaj al ĉiuj bulgaraj esperantistoj la reprezentoj el alilando: *Bela Berceli* — de la Hungara E-Asocio kaj en la nomo de UEA, *Draĥomir Koĉvara* — prezidanto de Ĉeĥa E-Asocio, prof. *Boja Popoviĉ* — prezidanto de la Jugoslavia E-Ligo, prof. *Momĉilo Šaponjiĉ* — prezidanto de LKK de la 58-a UK de Esperanto en Beograd en 1973 (li invitis la bulgarajn esperantistojn amase viziti la Kongreson), *Rudi Graetz* — prezidanto de la Centra Laborrondo de Esperanto en GDR, *Bill Keable* — angla E-veterano, *William Gilbert* — el Francio, ĉefredaktoro de la organo de MEM „Paco“, *Cathrin Bossong* — el Nederlando, *Jan Zawada* — en la nomo de la Centra Estraro de Pola E-Asocio.

Ivan Batakiev —

prezidanto de la mandatkomisiono, raportis, ke en la laboro de la Kongreso partoprenas 321 regulaj delegitoj, plej multe el la distriktoj de Sofio, Vraca, Plovdiv, Smoljan, Ĥaskovo ktp.

Stojan Kostadinov — prezidanto de la komisiono por statutŝanĝoj, legis la proponojn pri ŝanĝoj en la statuto. Kelkaj delegitoj faris apartajn rimarkojn.

La komisiono por la rezolucio proponis, ke la Kongreso komisiu al CK trastudi detale ĉiujn proponojn lige kun la presita kaj anticipe disdonita projekto-rezolucio, ĝustigi ĉion kaj finredakti ĝin. Tiu propono estis unuanime akceptita.

Kunčo Vălev — prezidanto de la komisiono por telegramoj, legis la projekto-tekstojn, kiujn la Kongreso entuziasme akceptis: al la CK de BKP, al la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto, al la Ministerio de Popola Instruado, al la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.

Sekvis la voĉdonado por novaj centraj gvidorganoj de BEA.

Ĥristo Dolĉinkov — prezidanto de la elekto-komisiono, anoncis, ke voĉdonis ĉiuj 321 delegitoj. La novaj CK kaj Centra Kontrolkomisiono estis elektitaj per granda plimulto de la voĉoj.

Tondrajaplaŭdoj esprimis la entuziasmon de la kongresanoj, kiam k-do

Sceno el „La urso“ de Ĉeĥov. Rolas *Belka Beleva*, *Anani Anev* kaj *Mihail Ĉobanov* el BET.



Nikola Aleksiev anoncis la novan konsiston de la Estraro de CK. Per tio la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj finiĝis.

Posttagmeze okazis fakkunvenoj de la esperantistoj junuloj, turistoj, fervojistoj, ĵurnalistoj, medicinistoj, scienclaboristoj, agrikulturaj specialistoj k. a. Estis fondita nova sekcio — de esperantistoj-literatoroj.

En la kadro de la Kongreso estis aranĝita impona koncerta vespero kun tre varia programo, kiun partoprenis Morjana K. Văleva, Vasja Petrova, Kunĉo Vălev kaj la profesiaj artistoj el la Bulgara Esperanto-Teatro: Belka Beleva, Anani Anev, Mihail Ĉobanov (ili brile prezentis la komedion „Urso“ de A. P. Ĉeĥov) kaj Kostadinka Nedeva kaj Georgi Kerelezov (prezentis la komedian scenon „Dio absolvu“ de Elin Pelin). La altnivela programo profunde plezurigis la ĉeestantojn.

La dua parto de la koncerto apartenis al la itala vira ĥoro „Monte Passubio“ el urbo Schio (Skio). La ĥoro majstre

Postkongresaj ekskursoj: ĉe la monumento de la fama partizana taĉmentestro Diĉo Petrov, fervora esperantisto.



plenumis varian programon kaj vekis la entuziasmon de la publiko. Kune kun la ĥoro estis veninta ankaŭ la vicurbestro de Schio.

Riĉan distran programon prezentis al la kongresanaro la lasta vespero. La Ŝtata Ensemblo por Popolaj Kantoj kaj Dancoj „Rodopa“ en Smoljan prezentis majstre varian folkloran programon el kantoj kaj dancoj de rodopanoj. Plezurigis la publikon per siaj kantoj la konataj artistoj-esperantistoj Maria Angelova kaj Miŝo Zdravev.

Post la programo — ĝisnoktomeza balo.

Aparte menciinda estas la internacia mitingo de la paco, kiu okazis en la kadro de la 38-a Kongreso (pri ĝi legu sur paĝo 9 de ĉi tiu numero).

La lasta kongrestago — la 5-a de julio — estis dediĉita al ekskursoj. Laŭ sia plaĉo multaj kongresanoj ekskursis al „Ĉudnite Mostove“ (Mirindaj Pontoj), aŭ „Ĵdreloto (La Montogorĝo), aŭ al Pamporovo kaj montopinto „Snejanka“ (Neĝero).

En la kadro de la Kongreso estis aranĝitaj kelkaj ekspozicioj: „Georgi Dimitrov kaj Esperanto“, „La Esperantomovado en la distrikto de Smoljan“ kaj filatela ekspozicio „Esperanto“. La kongresanoj kun intereso rigardis ilin.

✱

Ne ĉio povis esti plene respegulita en tiu ĉi raportaĵo. Sed eĉ se oni publikigus la tutan kongresan protokolon, ne ĉeestintoj ne povus havi ĝustan imagon pri la kongresaj tagoj, eksenti la bolantan atmosferon de la Kongreso. Estas multo, multo nepriskribebla, postulanta percepton per propraj okuloj, per propraj oreloj, per propra koro.

Sed unu estas certa: la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj donos novan fortan puŝon al la Bulgara Esperanto-Movado antaŭen, al novaj sukcesoj, al novaj venkoj!

*Petko Arnaudov,
gvidanto de la kongresa sekretariato*



*Postkongresaj ekskursoj:
antaŭ „Sudnita Mostove“
(La Mirindaj Pontoj) —
impona kelkdekmetrojn
alta roka majstraĵo de la
naturo, kiu vekas admiron
ĉe ĉiu vizitanto.*



TELEGRAMOJ DE LA KONGRESO

До Централния Комитет на
Българската Комунистическа Партия
София

Скъпи другари,

38-ият конгрес на българските есперантисти, състоял се на 3—4 юли 1972 г. в гр. Смолян, изпраща най-искрени, възторжени поздравии на Димитровския централен комитет на родната Комунистическа партия, водеща уверено нашия народ напред, към сияйните върхове на най-щастливото човешко общество — комунизма.

Ние изразяваме дълбоката благодарност и признателност на всички български есперантисти за добрите условия, които Партията и народната власт създават за развитието на есперантското движение в нашата страна. Дълбоко сме убедени, че българското есперантско движение и занапред ще намира такава подкрепа от страна на Партията и социалистическата държава, за да може все по-успешно да решава своите големи и благородни задачи по разпространяването на международния език есперанто всред нашите трудещи се и младежта, по патриотичното и интернационалното възпитание и културното издигане на своите членове, за укрепването на приятелството и сътрудничеството между всички народи, за сигурност, мир и щастие на земята.

На грижите и помощта на Партията ние, българските есперантисти, ще отговорим с увеличена енергия и непресъхващ ентузиазъм, като всеотдайно ще работим по градове и села, в заводи, предприятия и научни институти, за да се превърнат в живо дело решенията на историческия Десети конгрес на Партията, да се осъществяват неговите смели предначертания за далечното и близкото бъдеще на Родината, възплътени в Програмата на Партията и в Директивите за Шестата петилетка. Едновременно с това ние все по-пълно ще използваме есперанто, за да създаваме широки връзки на нашите трудещи се с трудещите се от другите страни, да пропагандираме в чужбина грандиозните успехи на нашето социалистическо строителство, да популяризираме красотите и курортите на нашата Родина, нейното героично минало, славно настояще и още по-славно бъдеще. Чрез есперанто ние печелим и ще печелим все повече нови приятели на нашето социалистическо Отечество в целия свят.

Да живее родната Комунистическа партия — мъдрият вожд на нашия народ по пътя на всеобщото щастие, пътя на комунизма!

От конгреса



Скъпи другари,

38-ият Конгрес на българските есперантисти, състоял се в гр. Смолян на 3—4 юли 1972 г., ви изпраща пламенни, възторжени поздравии.

Българските есперантисти с жар работят, за да се превърнат в живо дело решенията на Десетия конгрес на Българската комунистическа партия. Те дават самоотвержено своя съзидателен труд в изграждането на социализма и комунизма в нашата Родина. Българският есперантски съюз, колективен член на Отечествения фронт, разгръща активна дейност на идеологическия фронт, като възпитава своите членове в дух на пламенно родолюбие и национална гордост, на пролетарски интернационализъм и искрено миролюбие. В това отношение Българският есперантски съюз е добър помощник на Партията и Отечествения фронт в техните усилия да сплотяват всички трудещи се в крепко, неразбиваемо народно единство, да възпитават новия човек в нашето социалистическо общество.

Ние заявяваме, че все по-пълно ще използваме международния език есперанто за създаване на нови и нови връзки на нашите трудещи се с гражданите в другите страни, за все по-широко пропагандиране постиженията на нашия народ в строителството на новия живот, за популяризиране в чужбина природните красоти, курорти и забележителности на нашата Родина, за печелене на нови приятели на Народна република България във всички кътчета на земята. В това отношение езикът есперанто дава големи възможности и ние все по-пълно ще използваме тези възможности. На международната арена българските есперантисти са в първите редици на борбата за мир и дружба между народите, за щастие на човечеството.

Надяваме се, че напред все повече ще се развиват връзките между Българския есперантски съюз и Отечествения фронт, ще се засилва съвместната работа между есперантските окръжни комитети и дружества и комитетите и организациите на Отечествения фронт.

Нашите лозунги са: Есперанто — в служба на социалистическата Родина!

Чрез есперанто — за приятелство и сътрудничество между народите, за мир на земята!

Да живее Отечественият фронт — могъщата патриотична организация на българския народ!

Да живее и процъфтява нашата скъпа социалистическа Родина — Народна република България!

От конгреса

До Другаря Министър
на Народната просвета
София

Другарю Министър,

Българските есперантисти, събрани на своя 38-и конгрес в гр. Смолян (3—4 юли 1972 г.), изпращат лично на Вас, както и на Вашите сътрудници от Министерството на народната просвета, най-искрени, топли привети.

Ние благодарим горещо на почитаемото Министерство за неговото положително отношение към международния език есперанто, изразено и в приветствието от Ваше име до Конгреса, и за помощта, оказана ни досега при разпространението на езика сред българските учители и учаци се. Особена благодарност Ви изразяваме за помощта, която ни оказвате за кръжочното и факултативното изучаване на есперанто в редица средни и основни училища, за издадената от Министерството програма за обучението по есперанто в училищата, за съдействието, което получихме от него за запланиране на учебник по есперанто за учациите се, и пр. Надяваме се, че тази помощ ще получаваме от Министерството и за в бъдеще, за да се разширява все повече изучаването на есперанто в училищата, да се постави то на здрави научно-методически основи и да допринесе активно за патриотичното и интернационалното възпитание и общокултурното издигане на подрастващите. В това отношение особена роля ще изиграе и педагогическият експеримент за преподаване на есперанто в някои училища в страната.

Уверяваме Ви, другарю Министър, че българските есперантисти, в чиито редици броят на учителите е значителен, ще продължат да работят с неотслабващ жар и идеализъм, за да се разширяват все повече и посредством езика есперанто връзките на



нашния народ с трудещите се с други страни, да се популяризират огромните постижения на нашето социалистическо строителство, нашата славна история и самобитна национална култура, да се популяризира Народна република България като привлекателен обект на международния туризъм. Чрез богатите възможности, които дава езикът есперанто, ние работим и ще продължаваме да работим за сплотяването на честните, демократични и миролюбиви хора по земята в борбата за приятелство и сътрудничество между народите, за траен мир и щастие в света.

Учителите-есперантисти най-активно ще провеждат политиката на Партията за преустройство на нашето образователно дело, за изграждането на идейно и морално здрава, предана на социализма и комунизма патриотична младеж.

Да живее и процъфтява нашата скъпа социалистическа Родина — Народна република България!

Да живее и побеждава делото на свободата, мира и демокрацията в целия свят!

От конгреса

Al la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio Hanojo

Karaj vjetnamaj gefratoj,

Ni, la delegitoj kaj la gastoj de la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj, okazinta je la 3-4 de julio 1972 en urbo Smoljan, esprimas senliman admiron pri la ekskluzive brava kaj justa batalo de via bonega popolo por libereco kaj sendependeco. Ni kun tremo sekvas tiun malegalan heroan batalon, kaj ĉiu via sukceso aŭ malsukceso reĥas ĝojige aŭ malĝojige en niaj koroj. La bulgaraj esperantistoj multfoje esprimis kaj ankaŭ nun esprimas koleran indignon kaj proteston pri la barbara agresimilito de Usono kontraŭ la vjetnama popolo.

Ni postulas de la registaro de Usono ĉesigi la barbarajn bombardadojn de pacaj urboj kaj vilaĝoj en Demokratia Respubliko Vjetnamio, de ĝiaj transportaj nodoj kaj irigaciaj sistemoj.

Ni postulas, ke Usono levu la minigon de la havenoj de DR Vjetnamio kaj la blokadon de la lando.

Ni postulas, ke la registaro de Usono rilatu serioze al la pacaj traktadoj en Parizo por plene kaj senkondiĉe retiri la usonajn armetrupojn kaj militmaterialojn el Vjetnamio kaj definitive lasi la vjetnaman popolon mem trakti kaj mem solvi la problemojn de sia sorto.

Kune kun la tuta bulgara popolo ni, la bulgaraj esperantistoj, deklaras: ĉiumomente ni estas kun vi, karaj vjetnamaj gefratoj! Kaj ni pretas doni al vi ĉiun kaj ĉian helpon, kiun postulas de ni nia amo al la libereco kaj la proleta internaciismo.

Vivu kaj kroniĝu per plena sukceso la justa batalo de la vjetnama popolo por libero kaj nacia sendependeco!

Vivu kaj venku la batalo de la popoloj en la tuta mondo por paco, feliĉo kaj socialismo!

De la kongreso

INTERNACIA MITINGO DE LA PACO

Je la 4-a de julio en Smoljan, enkadre de la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj, okazis internacia mitingo de la paco, organizita de la Centra kaj Distrikta Komitatoj de Bulgara Esperantista Asocio kaj la Urba Komitato por Defendo de la Paco en urbo Smoljan. Partoprenis la kongresanoj, la eksterlandaj gastoj de la Kongreso kaj loĝantoj de la urbo.

La mitingon malfermis k-do Nikola Aleksiev — la prezidanto de BEA kaj de MEM. Li substrektis, ke Rodopi-montaro kaj speciale la Smoljan-regiono estas fortikaĵo de la bulgareco. Ĝia loĝantaro estas fidela al BKP kaj la bulgara-soveta amikeco. Ne hazarde ĉi tie la bul-

garaj esperantistoj okazigas sian kongreson. K-do Aleksiev emfazis, ke ĉefa direkto en la laboro de la bulgaraj esperantistoj estas la batalo por interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj, por paco en la mondo. En la hodiaŭa momento ili strebas al aktivigo de la batalo por ĉesigo de la agresimilito de Usono en Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo kaj por paca solvo de la militkonflikto en Proksima Oriento. En Eŭropo nia ĉefa celo estas batali por kunvoko de Konferenco por sekureco kaj kunlaboro inter la eŭropaj registaroj.

Antaŭ la mitingo parolis la reprezentanto de la sovetaĵ esperantistoj k-do Magomet Isaev.

Li emfazis, ke la amikeco inter la popoloj estas cemento, kiu lutas la multnaciajn landojn kaj helpas la popolojn vivi en paco. La proleta internaciismo estas „plej supera formo de la amikeco inter la popoloj“. Ĝi havas klaran finan celon — konstrui komunisman socion pere de aktiva reciproka helpo. La rilatoj inter la sovetaj kaj bulgara popoloj estas reala enkorpiĝo de la Lenin-principoj de proleta internaciismo. Simbolo de la bulgara-soveta amikeco kaj de la batalo por nova vivo, por la plej feliĉa socio en la historio de la tuta homaro estas la granda filo de la bulgara popolo Ĝerogi Dimitrov, kiu estis ankaŭ neŝancebla patrioto de la Soveta Lando. Dimitrov prave diris, ke vera internaciisto povas esti nur tiu, kiu estas vera patrioto de sia patrolando, kaj inverse: nur tiu povas esti konsiderata kiel vera patrioto, kiu estas vera internaciisto. Ĉi-jare la popoloj de Sovetunio celebras la 50-jaran datrevenon de la fondiĝo de sia socialisma ŝtato, kiu estas granda venko de la principoj de l'internaciismo.

Varme kaj kortuŝe parolis pri la heroo batalo de la vjetnama popolo k-do Nguyen Hai Trung. Li rakontis pri la kruelaĵoj de la usonaj agrosuloj, kiuj superas la teruraĵojn de la hitleristoj. Nun la vjetnama popolo batalas ne nur por si mem, ne nur por sia libero kaj sendependeco, sed ankaŭ por la libero kaj la sendependeco de ĉiuj popoloj. Ĝi batalas kontraŭ la imperiisma monstro, kiu minacas la liberon kaj la sekurecon de ĉiuj popoloj, unu-loke de la malgrandaj. K-do Trung esprimis la dankon de la vjetnamaj esperantistoj pro la konstanta helpo, kiun donas al batalanta Vjetnamio la bulgara registaro, la bulgaraj esperantistoj, la tuta bulgara popolo. Li esprimis firman kredon, ke la justa batalo de la vjetnama popolo nepre — kaj baldaŭ — venkos!

En la nomo de la germanaj esperantistoj k-do Detlev Blanke — sekretario de la Centra Laborrondo de Esperanto en GDR, substrekis, ke la komuna sistema kaj daŭra batalo por paco, efektivigata de la socialismaj landoj frunte kun Sovetunio kaj subtenata de ĉiuj progresemaj fortoj en la mondo, kreis en Eŭropo pli bonan klimaton surbaze de la principoj de paca kunekzistado de landoj, sendepende de ilia socia kaj politika sistemo. Ĝiaj sekvoj estas ankaŭ

la gravaj kontraktoj inter GFR — Pollando, ankaŭ la kontrakto inter GDR, GFR kaj Okcidenta Berlino. Tiuj kontraktoj sendube kreas bonan grundon por unu eŭropa konferenco por sekureco, en kiu la eŭropaj registaroj pritraktos kaj solvos la problemojn de nia kontinento por garantii la pacon en ĝi. Por normaligi la staton en Eŭropo estas necese, ke jam ne ekzistas unu Germanio, sed ekzistas du tute diferencaj, suverenaj kaj sendependaj germanaj ŝtatoj. Agnoskante la realon, GFR kaj la aliaj okcidentaj landoj devas ankaŭ agnoski jure GDR. En UNO kaj ĝiaj specialaj organoj kaj organizaĵoj la du germanaj ŝtatoj devas havi egalajn rajtojn.

William Gilbert el Francio, ĉefredaktoro de gazeto „Paco“, notis, ke ĉi-jare la bulgara popolo celebras la 90-an datrevenon de la naskiĝo de sia granda filo Ĝerogi Dimitrov, sed tiu ĉi evento estas celebrata ankaŭ de la laboruloj en la tuta mondo. La nomo de Dimitrov vekas la imagon pri eminenta gvidanto ne nur de la bulgara, sed ankaŭ de la tutmonda laboristaro kaj venas tuj post la nomoj de Marks, Engels, Lenin. Poste k-do Gilbert emfazis, ke la krimoj de la usonaj kaj ceteraj imperiistoj estas provoko al la konscienco de la tuta homaro. Ni ne povas eĉ por momento forgesi, ke la vjetnama popolo travivas plej pezan dramon, ke la usonaj aviadiloj bombardas barbare vjetnamajn urbojn kaj vilaĝojn, ekstermas per napalmo virojn, virinojn, maljunulojn kaj infanojn, neniigas la vegetaĵaron de la lando, detruas la irigaciajn sistemojn ktp. Ili faras genocidon — la plej abomenan krimon de ĉiuj epokoj.

W. Gilbert rakontis ankaŭ pri la laboro de la franca sekcio de MEM, kiu kune kun ĉiuj progresemaj fortoj de la franca popolo batalas por paco en Vjetnamio, en la Proksima Oriento kaj en la tuta mondo, por kunvoko de konferenco por kolektiva sekureco en Eŭropo, por paca kunekzistado de ĉiuj popoloj, sendepende de ilia soci-politika sistemo.

Kunĉo Vălev proponis, ke la mitingo akceptu du telegramojn: unu por solidareco kun la batalanta vjetnama popolo, kaj duan — proteste al la prezidanto de Usono Nixon. Li tralegis projektojn por la telegramoj, kiujn la mitingo akceptis per tondraj aplaŭdoj.

K. Vălev

Pere de la Ambasadado de Usono en Sofio Al la Prezidento de Usono — Vaŝingtono

Sinjoro Prezidento,

La internacia mitingo, organizita de la Centra kaj Distrikta Komitatoj de la Bulgara Esperantista Asocio kaj la Distrikta kaj Urba Komitatoj por Defendo de la Paco en urbo Smoljan, Bulgario, je la 4-a de julio 1972 en la kadro de la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj, kun partopreno de delegitoj kaj gastoj el 10 landoj kaj urboj de Smoljan, esprimas sian koleran indignon kaj proteston kontraŭ la daŭra militintervenado de Usono en Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo.

De Vi la popoloj atendas ĉesigon de tiu ĉi malhonora agreso. Dume Vi entreprenis novajn arogajn farojn kontraŭ Vjetnamio: laŭ Via ordono estis minitaj la havenoj de DR



Vjetnamio kaj blokita la lando flanke de la maro, oni kruelege bombardas dense loĝitajn regionojn, transportajn nodojn, irigaciajn sistemojn k. a. en la lando. Pro la politiko de genocido, kiun la usona registaro delonge efektivas en Vjetnamio kaj en la aliaj landoj de Hindoĉinio, ĝi senmaskigis sin antaŭ la tuta mondo kiel ekzekutisto de la libero kaj la nacia sendependeco de la malgrandaj nacioj, kiel ĝendarmo de la popoloj.

La mitingo insistas, ke Usono tuj kaj senkondiĉe ĉesigu sian agreson en Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo, ke ĝi retiru siajn armetrupojn kaj militmaterialojn el ili kaj lasu la popolojn mem solvi sian sorton.

Ni insistas, ke la registaro de Usono revenu al la tablo de pacaj traktadoj en Parizo kaj akceptebla solvo estu trovita surbaze de la propono de la Provizora Revolucia Registaro de Suda Vjetnamio.

De la mitingo

KOMUNIKAĴO

Reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando kaj Sovet-Unio, partoprenintaj la 38-an Kongreson de la Bulgara Esperanto-Asocio, pritraktis en fruktodonaj interparoladoj komuninteresajn i. a. interlingvistikajn problemojn.

Estis pritraktitaj la enhavo kaj la formoj de pli intima kunlaborado de la Esperanto-organizaĵoj el la menciitaj landoj en la intereso de paco, internaciismo kaj pli vasta uzado de Esperanto por progreso kaj humanismo.

Smoljan, la 5-an de julio 1972

ALTAJ DISTINGOJ DE ESPERANTISTOJ

Lige kun la Tago de la Bulgara Klerigo kaj Kulturo, de la Slava Skribo kaj la Bulgara Gazetaro—la 24-a de Majo, estis honoritaj de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario la jenaj samideanoj:

per titolo „Popola Aganto de la Kulturo“—akademiano PETR DINEKOV—literatura kritikisto, profesoro de bulgara literaturo en la Sofia Universitato, „Kliment Ohridski“;

per titolo „Popola Instruisto“—VASIL BOZAROV—merita instruisto, vicdirektoro de la Scienc-esplora Instituto de l' Instruado „Todor Samodumov“;

per ordeno „Popola respubliko Bulgario“—II grado la Esperanta veterano el Sofio MELEŜKO ŜIŜKOV okaze de lia 75-jariĝo kaj pro liaj meritoj en la batalo kontraŭ faŝismo kaj en la konstruado de la socialismo.



VERDA TABULO

Nia fervora s-ano DIMITR IVANOV Plovdiv (str. Stranga 5) ankaŭ por la kuranta jaro inde plenumis sian Esperanto-devon. Li kolektis 120 abonojn por nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“.

Imitinda kaj imitenda ekzemplo por la abonkampanjo de 1973, staranta antaŭ ni!

KAVALIRO
de Konstantin Gusev

Kiam al la sovaĝa nazio
ĵetis vi la kondamnon de l' mond',
Ameriko, Eŭropo, Azio
aŭdis voĉon de l' venka estont'.

Montras via majesta figuro —
kiel ĉiam fidela lumtur' —
vojon ne per nebula aŭguro —
per klarvido de l' fora futur',

per la scio de ŝtorma socio,
kie luktas feliĉ' kaj amar',
kie plaŭdas la slava nacio
en la maro de l' tuta homar'.

Tra tempestoj de l' dua milito
nin inspiris ekzemplo de vi,
kaj heroe leviĝis pelito,
vin sekvinte kun hela envi'.

Ni de vi ion firman heredis,
benis nin ĝis la fin' via fort':
multaj falis kaj tamen ne cedis —
por la venko batalis ĝis mort'.

Kavaliro sen ajna riproĉo,
inspiriĝis de vi nia jun';
via, tiam levinta nin, voĉo
en la koroj ne ĉesas ĝis nun.

Ĝi hodiaŭ ordonas, devigas,
konvinkante: en ŝtorma malhel'
la homaro ne drivas — navigas
al la luma, vokanta ĝin cel'.

La batalo por ĝi — faro mia,
kaj ne gravas — ĉi tie aŭ for...
Lim' de l' sanga tero vjetnamia
fluas tra miaj nervoj kaj kor'.

Kaj ne centoj jam, nek eĉ jam miloj —
milionoj de ni sur la ter'
laŭ la faroj al vi iĝis filoj —
kiel vi — leninanoj en ver'!

Leninanoj ni, samkolonanoj,
batalantoj por lumo kaj bon'.
Ĉiuj monstroj obskuraj jam nanoj
iĝas antaŭ la rirna kolon'.

Eble emociĝis nun mi tro,
bolas sango pro mem via nom'...
Sonas ĉie surtere „Dimitrov“
kiel alta simbolo de l' Hom'.

Moskvo, 1972

**BULGARA-GERMANA VESPERO PRI
G. DIMITROV EN SOFIO**

La 16-an de junio la CK de BEA kune kun la Kultura kaj Informa Centro de GDR en Sofio organizis grandan kunvenon dediĉe al la 90-a jubileo de Georgi Dimitrov. Ĝi okazis en halo „Slavejkov“.

La kunvenon salutis la kultura ataŝeo de GDR en Sofio. Li substrekis, ke la memoro pri G. Dimitrov estas tre kara por la germana popolo, kiu lin estimas kaj amas.

Speciale por tiu ĉi kunveno alvenis el GDR k-dino Linde Knöschke (Knjoŝke), kiu faris prelegon je temo: „Kiel oni efektivigas la testamenton de G. Dimitrov en GDR“. Vortŝpare, sed tre konvinke k-dino Knöschke rakontis pri la ĉiufankaj sukcesoj de la unua en la mondo germana socialisma ŝtato. Tiuj sukcesoj estas la plej digna monumeto de la



germanaj laboruloj al Dimitrov, kiu ĝuste en ilia lando montris, ke la faŝismo povas esti venkita kaj devas esti venkita.

Post la prelego de k-dino Knöschke, akompanita de tondraj aplaŭdoj, artistoj el la Bulgara Esperanta Teatro plenumis belartan programon. Partoprenis ĝin la popolaj aktorinoj Margarita Duparinova kaj Tanja Masalitinova,

MITINGO DE LA PACO

Fine de junio ĉ. j. la Distrikta kaj Urba Komitatoj por Defendo de la Paco, la DK kaj UK de Patrolanda Fronto kaj la DK de Bulgara Esperantista Asocio en Târgoviște organizis grandan mitingon de la paco kaj amikeco inter la popoloj. La mitingo estis dediĉita al la 90-a naskiĝtago de Georgi Dimitrov, la 30-a datreveno de la fondiĝo de Patrolanda Fronto kaj la 38-a Kongreso de BEA. Partoprenis ĝin esperantistoj el urbo Târgoviște kaj ĝia distrikto, el la distriktoj de Ŝumen, Razgrad, Varna, Ruse k. a.

Super la scenejo de la Dramteatro, ornamita per portreto de G. Dimitrov, brilas lia penso: „Ne sufiĉas deziri la pacon — estas necese batali por ĝi!“

Karaj gastoj de la mitingo estis Nikola Aleksiev — prezidanto de BEA kaj de MEM, William Gilbert el Francio, Dao Anh Kha kaj Nguyen Hai Trung — reprezentantoj de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kaj

la geartistoj Belka Beleva kaj Anani Anev, la operkantistino Maria Angelova, la popolkantistino Valentina Despotova, la pianistinoj Elka Ruseva kaj Ĝulija Ganeva, la akordionisto Ivan Kirev k. a.

Fine estis projekciita kolorfilmo pri la socialisma konstruado en GDR, kun Esperantoparolo.

Sofiano

ing. Draĥomir Kočvara — prezidanto de Ĉena Esperanto-Asocio.

La mitingon malfermis Conju Marinov — prezidanto de DK de Patrolanda Fronto.

Kun granda atento la ĉeestantoj aŭskultis raporton de N. Aleksiev, kiu parolis pri la senmorta afero de G. Dimitrov, pri lia batalo kontraŭ la faŝismo kaj por konservo de la paco. Aleksiev substrekiis, ke la esperantistoj el ĉiuj landoj inspiriĝas de la ideoj kaj la ekzemplo de G. Dimitrov. Per Esperanto ili batalas por paco kaj amikeco inter la popoloj, kontraŭ la imperiismo.

En sia salutparolado W. Gilbert, ĉefredaktoro de la gazeto „Paco“ — organo de MEM, esprimis sian admiron pri la sentima batalo de G. Dimitrov por senmaskigo de la faŝismo kaj por konservo de la paco. Li esprimis ankaŭ sian grandan kontentigon pro la sukcesoj de nia lando en la konstruado de socialismo. Gazeto „Paco“, deklaris li, ankaŭ estonte donos

Sekvas sur (p. 15)

JUNULARAJ ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN TROJAN-BALKANO

La 13—14-an de majo en la loĝloko Beklemeto, situanta en Trojan-Balkano, okazis renkontiĝo de la E-junularo el Loveĉ, Sofio (studentoj), Polski Trambeŝ, Târgoviște, Trojan k. a., dediĉita al la 90-jara datreveno de la naskiĝo de nia neforgesebla gvidanto kaj instruanto Georgi Dimitrov kaj de la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj. Partoprenis ĉirkaŭ 130 geesperantistoj.

Lernantinoj-esperantistinoj el la gimnazio de Trojan sub la gvido de k-dino Ikonopisova prezentis belartan programon en bulgara lingvo kaj Esperanto, kiu ravis la publikon.


K-dino Cvetana Minkova faris raporton pri la vivo kaj la afero de Dimitrov.

La gastoj trarigardis la rimarkindaĵojn de la Trojana Balkano — la malnovan romian vojon, la arbaran herbejon, kie estis la bivako de la rusa generalo Karov en la Liberiga Milito de 1878, la ripozdomojn, pitoreskajn lokojn k. a.

Ĉe la disiĝo ĉiuj esprimis deziron, ke similaj renkontiĝoj fariĝu bela tradicio de la bulgara Esperantista movado — ĉiujare, en diversaj lokoj kaj regionoj.

V. Mitovski

La partoprenantoj de la renkontiĝo en Trojan-Balkano.



sian kontribuon por plifirmigo de la tutmonda pacmovado, por plifortigo de la batalo kontraŭ la imperiismo kaj koloniismo.

Nguyen Hai Trung, reprezentanto de la esperantistoj en DR Vjetnamio, diris, ke en sia batalo la vjetnama popolo estas inspirata de la ideoj kaj heroeca ekzemplo de G. Dimitrov. Ĝi luktos per siaj fortoj ĝis la fina venko super la usona imperiismo. La esperantistoj el Vjetnamio uzas la internacian lingvon Esperanto por popularigi la justan batalon de sia popolo por libero kaj plena nacia sendependeco.

La sekretario de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kaj redaktoro de gazeto „Informado“ Dao Anh Kha esprimis la dankon de la vjetnamaj esperantistoj al la bulgara popolo pro la sincera simpatio kaj frata helpo, kiun ĝi donas al la vjetnama popolo en ĝia batalo kontraŭ la usonaj agresuloj.

Inĝ. Draĥomir Kočvara salutis la ĉeestantojn

en la nomo de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj kaj bondeziris novajn, ankoraŭ pli grandajn sukcesojn de nia lando en la konstruado de matura socialisma socio.

La ĉeestantoj unuanime akceptis telegramojn al CK de BKP, al la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto kaj la 38-a Kongreso de BEA.

Recitalon pri Georgi Dimitrov en Esperanto prezentis junpionira grupo, someruminta ĉe Balatono, Hungario. Riĉan programon, dediĉitan speciale al la Dimitrov-jubileo, plenumis la Ensemblo por Kantoj kaj Dancoj „Mizia“ ĉe la Sindikata Domo de la Kulturo en Târgoviște.

La mitingo kontribuis por plua aktivigo de la pacdefenda movado inter la esperantistoj kaj la laboruloj en la distrikto de Târgoviște.

Ivan Milenkov

ORATORA KONKURSO DE „FAJRERO“ — DOSPAT

La Lernanta Grupo ĉe E-societo „Fajrero“ en Dospat, Smoljan-distrikto, kiu nombras 45 membrojn, organizis oratoran konkurson por la lernantoj. La temoj estis skribitaj sur granda tabulo kaj rememorigis preskaŭ tutan monaton pri tiu grava antaŭstaranta evento. Jen ili:

1. Georgi Dimitrov — vivo kaj agado.
2. Esperanto — lingvo internacia.
3. Zamenhof — kreinto de Esperanto.
4. Dospat — hodiaŭ kaj morgaŭ.
5. Miaj amikoj tra la mondo.

La konkursvespero komenciĝis per Esperantaj kaj aliaj kantoj, per dancoj kaj amuzado.

Post kelka tempo la prezidanto de la E-Grupo Ivo Ĉauŝev malfermis la konkurson mem. Li parolis pri la temo „Miaj amikoj tra la mondo“. Libere kaj interese li rakontis pri sia lernado de Esperanto kaj pri siaj novaj amikoj

akiritaj pere de Esperanto, — en Sovetunio, Kanado, Pollando, GDR, Hungario. Li substrekkis la penson, ke per la Internacia Lingvo la bulgaraj esperantistoj povas bonege konigi nian socialisman patrolandon kaj nian novan vivon al multaj homoj tra la tuta mondo.

Parolis ankoraŭ kelkaj aliaj lernantoj pri diversaj el la fiksitaj temoj. Denove sekvis kantoj kaj dancoj — kaj denove antaŭ la ĉeestantoj aperis novaj oratoroj.

La ĵurio anoncis la rezultojn de la konkurso, salutante ĉiujn gajnintojn per Esperanta kanto.

Unuan premion ricevis la lernanto Ivo Ĉauŝev — la libron „Paŝoj al plena posedo“ kaj grandan E-diskon.

Duajn premiojn ricevis Nedjalka Petrova kaj Ivanka Bubanova — po unu bela bluzo.

Trian premion ricevis Aleksandr Dolapĉiev — ĉemizon.

Ĉiuj partoprenintoj en la Konkurso ricevis E-insignojn.

Oni estis tre kontentaj: la partoprenantoj ekhavis pli grandan kuraĝon en la laboro por ankoraŭ pli bona posedo de la lingvo, kaj la ĉeestantoj komprenis, ke oni devas serioze kaj obstine studi Esperanton. Krome la Konkurso havis grandan propagandan signifon pri la Internacia Lingvo en la gimnazio kaj en la tuta urbo.

Emil Ĉirpanski



La junaj esperantistoj de Dospat estis tre ĝojaj havi gaste nian s-aninon Ljudmila Paspaljeva el Radio Sofia, infanverkistino (la dua maldekstre). Ŝi partoprenis la Legadon de Verkistoj en la Semajno de la Infanlibro en la urbo (majon ĉ. j.).



AMIKA RENKONTIĜO

La Esperanto-grupo en Weimar aranĝis en la klubdomo „Erich Wendt“ amikan renkontiĝon kun bulgaraj esperantistoj, kiuj dum sia vojaĝo tra GDR vizitis ankaŭ Weimar-on. Gerhard Hornbogen, prezidanto de la Weimar-a grupo, honoris la vivon kaj la agadon de Georgi Dimitrov. Inter la bulgaraj gastoj troviĝis la membro de CK de BEA Tinka Lakova (ankaŭ reprezentantino de MEM).

„Das Volk“, 13. VI. 1972

Pri la sama renkontiĝo skribis ankaŭ J. „Thüringer Neuste Nachrichten“ (13. VI. 1972) sub titolo „Intimaj amikaj rilatoj“.

ORGANIZA VIVO

RENKONTIĜO DE TRI GENERACIOJ DE ESPERANTISTOJ

La Lernanta Esperantista Societo „Anne Frank“ ĉe la Teksa Teknikumo en Vraca organizis solenan renkontiĝon de tri generacioj de esperantistoj, dediĉitan al la 90-a datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov, la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj kaj la 10-a jaro de fakultativa instruado de Esperanto en la Teknikumo.

Ĉeestis multaj veteranoj de la Esperanto-movado, ekslernantoj-fondintoj de la Esperanto-societo en la Teknikumo, lernantoj kaj multaj gastoj el Peŝtera, Kneja, Vidin, Bjala Slatina, Tolbuhin, Sofio k. a.

Rememoroj pri Esperanto dum la pasinteco rakontis la veteranoj Ĥristo Panĉev, Ekaterina Mineva kaj Ceno Partov.

Raporton pri la Esperanto-movado en la Teknikumo faris la instruisto de Esperanto Enjo Daskalov. Ni kredas, ke kelkaj faktoj el lia raporto prezentas intereson por ĉiuj.

En 1959 en la Teknikumo estis malfermita la unua Esperanto-kurso kaj fondita Esperanto-grupo, kiu komencis varian agadon: aranĝadon de vitrinoj kaj ekspozicioj, deklamadon, partoprenon en urbaj manifestacioj, klerigajn kunvenojn, amuzvesperojn, partoprenon en internaciaj laborbrigadoj kaj seminarioj, amasan korespondadon kun eksterlando k. a. Ekde 1961/1962 lernojaro en la Teknikumo komenciĝis fakultativa (nedevisa, sed oficiala) instruado de Esperanto. En 1964 la kantgrupeto ĉe la fakultativa kurso transformiĝis en lernejan ĥoron, kiu post unu jaro fariĝis urba esperantista junulara ensemblo. Sub la gvido de la ĥorestro Angel Angelov ĝi gajnis multajn sukcesojn.

En 1968 la E-grupo transformiĝis en la duan en Bulgario lernantan E-societon. En

SEMINARIO PRI GEORGI DIMITROV EN LITOVIO

La 9-an de julio 1972 ĉe E-rondeto „Internacia Amikeco“ en Riga, Litovio, okazis E-seminario, dediĉita al Georgi Dimitrov lige kun la 90-a datreveno de lia naskiĝo.

Unu el la plej elstaraj agantoj de la internacia komunista kaj laborista movado, Georgi Dimitrov estas fiero ne nur de la bulgara popolo, sed de ĉiuj progresemaj homoj en la mondo.

La E-poetino L. Jevsejeva prelegis laŭ temo: „Georgi Dimitrov — glora filo de la bulgara popolo“ kaj „Georgi Dimitrov kaj lia rilato al Esperanto“. S. Neillande prezentis la verkon de Bojka Batalska „Georgi Dimitrov kaj la junularo“. Fine pri G. Dimitrov parolis J. Gold.


Ĉiuj prelegoj estis akceptitaj per laŭtaj aplaŭdoj, esprimantaj estimon al G. Dimitrov kaj la bulgara popolo.

S. Neillande

1969 estis malfermita la unua Esperantista foto-kinoklubo kun celo prepari diapozitivojn kaj filmojn por la Esperantaj lecionoj. Nun jam funkcias teatra kaj deklama E-trupoj kaj turista sekcio.

Ĝis nun pli ol 80% de la lernantoj en la Teknikumo lernis la Internacian Lingvon. Ĉiujare en la lerneja programo estis antaŭviditaj fakultativaj studhoroj. Por tio grave helpas la direktorino de la Teknikumo k-dino Petrana Andreeva.

... La solenan renkontiĝon de tri Esperanto-generacioj salutis kvinjaraj infanoj de la infanĝardeno n-ro 9, junpioniroj de lernejo „Sofroni Vračanski“, reprezentantoj de la junaj esperantistoj el Peŝtera (pere de St. Kukuŝev kaj Dineva), de Lernanta E-Societo „Verda Rarreto“ ĉe la gimnazio „Ĥristo Botev“ en Vraca



(pere de B. Mladenov kaj Blagoeva), de Lernanta E-Societo „Julio Baghy“ ĉe la Teknikumo por Vestado (pere de G. Marinov), de ekslernantoj-aktivuloj (Vâlčko Marinski) k. a.

La vicprezidanto de la CK de BEA Hristo Gorov dekoris per jubileaj insignoj 9 personojn: la direktorinon de la Teknikumo Pet-rana Andreeva, la fondintojn de la Esperanto-movado en ĝi K. Ivanov, Strahil Dimitrov, P. Peĉanovska, N. Pavlov, V. Marinski, A. Petrov, M. Cekov kaj Kiril Borisov. Per specialaj diplomoj kaj libroj estis premiitaj ankoraŭ 41 esperantistoj — aktivuloj, partoprenintoj en belartaj programoj, fondintoj de la unua modela Esperanto-kabineto k. a.

La renkontiĝo finiĝis per literatura programo: belarta muntaĵo „Por la libero“ kaj teatraĵeto „Sedjanka“.

La sekvan tagon multaj esperantistoj ĉeestis malfermitan lecionon de k-do Enjo Daskalov en II-a klaso.

Sub la gvidado de k-do Jordan Markov — sekretario de la Instruista Sekcio de BEA, la ĉeestantoj pridiskutis la lecionon. Post la pridiskuto ili vizitis la Esperanto-kabineton.

Lige kun la renkontiĝo estis aranĝita ankaŭ ekspozicio pri la agado de la E-societo kaj pri la vivo de Georgi Dimitrov.

Veselin Nikolov

Karaj gastoj el frata Debrecen

Multjara kora amikeco ligas la esperantistojn de la fratigitaj urboj Ŝumen kaj Debrecen (Hungario). Oni interŝanĝas korespondatajn, gastas unu al alia apartaj civitanoj, la E-societoj en ambaŭ urboj dividas spertojn ktp. Tiel la homoj proksimiĝas, la amikeco plifortiĝas.

Dum la tagoj antaŭ la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj ŝumenanoj travivis grandan ĝojon. Alvenis grupo da esperantistoj gvidata de Ŝadoroŝ Gyula — sekretario de la Fervojista E-societo en Debrecen.

Akompanitaj de la prezidanto de la DK de BEA Atanas Bojaĝiev la karaj gastoj vizitis la novan urbon Kaspiĉan. Ĉi tie ili renkontiĝis kun esperantistoj de la novefondita E-societo „Pliska“ kaj kun intereso trarigardis la Uzinon por Sanitara Ceramiko „G. Dimitrov“. Poste la gastoj vizitis la historiajn Pliska, Madara, Preslav kaj estis konigitaj kun la 1300-jara historio de la bulgara ŝtato. Grandan emocion travivis la gastoj kaj dommastroj vizitante la muzeojn de la fama hungara revoluciulo Lajoŝ Koŝut kaj de la granda filo de la bulgara popolo Vasil Kolarov.

La gastojn akceptis la prezidanto de la UK de Patrolanda Fronto Stojan Petkov. Li koncize konatigis ilin kun la agado de la urba patroland-fronta organizaĵo kaj de la Bulgara E-Asocio — kolektiva membro de la Patrolanda Fronto.

Rapide alvenis la horo por disiĝo. La 29-an de junio vespere en la Junulara Domo okazis adiaŭa renkontiĝo inter la gejunuloj — anoj de la Ŝumena Interklubo, la ŝumenaj esperantistoj kaj la gastoj. Al ili estis direktitaj elkoraj salutvortoj kaj enmanigitaj donacoj. La gvidanto de la hungara grupo tre kortuŝe dankis pro la varma akcepto. Li diris: „Karaj amikoj, unufoje mi estas en la patrujo: de G. Dimitrov kaj la frata urbo Ŝumen. Pri la bulgara gastameco ni estis aŭdintaj multe, sed tio, kien ĉi tie ni spertis, superas ĉion. Ni elkore dankas al la urba sovetoj, al la ŝumenanoj, al la esperantistoj, ke ili donis al ni eblecon vid kaj travivi ĉion. Ni kunportos al Debrecen plej belajn rememorojn pri vi, pri via urbo kaj pri Bulgario.“

Cvijatko Todorov

SUKCESAJ ESPERANTO-KURSOJ

Pomorie. En februaro E-societo „Trifon Hristovski“ en la nigramara urbo Pomorie organizis E-kurson, kiun vizitis 18 gekursanoj. Gvidanto estis Kalju Bjandov, la prezidanto de la DK de EEA en Burgas.

La kurso sukcese finiĝis en majo kun esperantlingva artprogramo fare de la gekursanoj.

Irina Dimitrova

La gekursanoj el Pomorie. Meze — la kursgvidanto.



Mezdra. Komence de junio en nia urbo finiĝis E-kurso por civitanoj, ĉevidita de Radka Pravčanska. La plejmulto de la gekursanoj estis junuloj. Ili lernis tre fervore kaj havas fortan deziron daŭrigi la perfektigadon kaj fariĝi bonaj esperantistoj.

Plej akurate lernis Ginka Marinova, Emilija Miĥajlova, Magda Grueva, Sneĵa Borisova, Petr Todorov kaj la plej juna esperantisto Mitko Veselinov.

Post la kursfiniĝo okazis komuna vesper-mango de novaj kaj malnovaj esperantistoj.

Dum la nova lernojaro la E-societo organizos novajn kursojn por civitanoj kaj junpioniroj.

Veselin Dimitrov



Esperanto tra la socialismaj landoj

RENKONTIĜO EN LENINGRADO

La 1-an de junio en Leningradon alvenis vagonaro de l'amikeco. Ĝi alveturigis en la apudnevan urbon aktivulojn de la Societo por Germana-Soveta Amikeco el Drezdeno kaj 130 esperantistojn, membrojn de la Germana Kulturlogo.

En la Domo de l'Amikeco la esperantistoj el GDR renkontiĝis kun membroj de la Leningrada Esperantista Klubo. Interesan raporton faris la gvidanto de l'germana grupo Ludwig Schödl. Li rakontis pri la historio de la Esperanto-movado en Germanio, substrekkis ĝian rolon en la batalo kontraŭ la faŝismo. Kiam Schödl suferis en Hitler-malliberejo, la laboristoj-esperantistoj el eksterlando organizis protest-kampanjon kontraŭ la teroro en la koncentrejo. Tio igis la hitlermurdistojn iomete moligi la kruelegan reĝimon por la politikaj malliberuloj.

Al la esperantistoj ŝuldas sian vivon la nuna prezidanto de Aŭstrio Franz Jonas, esperantisto. En la koncentrejoj li suferis krudajn kruelaĵojn kaj nur la internacia preskampanjo, organizita de l'esperantistoj, savis lian vivon.

Granda estas la kontribuo de l'esperantistoj en la batalo kontraŭ la reĝimo de Franco en Hispanujo. Ili eldonadis tie la gazeton „Popola Fronto“.

Ĉe la Renkontiĝo parolis ankaŭ S. Podkaminer — membro de la Leningrada Pacdefenda Komitato kaj soveta reprezentanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

— Ĉiu aktivulo-esperantisto devas esti batalanto por paco. Ĉiu batalanto por paco devas esti esperantisto — substrekkis li.

Pri la rolo de la junularo en la Esperantomovado raportis la aspiranto en la Leningrada

Universitato Kiril Velkov, bulgaro; pri la kulturkontaktoj de l'esperantistoj — la moskva ĵurnalisto A. Harkovskij.

J. Gold

(El g. „Sovetskaja Molodjoĵ“ — organo de CK de Komsomolo en Latvujo, n-ro 124, 25. VI. 1972)

JUBILEAS KRETINGANOJ

La 7—8-an de majo la E-rondeto en urbo Kretinga (Litovio) festis la 10-jaran jubileon de sia agado. Tiukaze estis organizita renkontiĝo, kiun partoprenis proksimume 60 personoj el diversaj urboj de Litovio, ankaŭ gastoj el najbara Latvio. Por la ĉeestantoj estis aranĝita E-ekspozicieto kaj prezentita bona koncerto, kiun plenumis la merita ĥoro „Gintaras“ (Sukceso).

La gvidantino de tiu ĉi Rondeto, la instruistino Izabele Ojĵunene, lernis Esperanton antaŭ pli ol dek jaroj. La novelernitan lingvon ŝi uzis ne nur por persona intereso, sed tuj organizis kurson por civitanoj. Tiel ekde 1962 ĉiujare la kursojn finas po 20—30 personoj. Multaj el ili (estintaj lernantoj) forveturis studi, aliaj uzas la lingvon nur por persona korespondado, kelkaj restis ĉe la instruistino kaj aktive helpas ŝin kaj la E-movadon en la tuta respubliko. Plej notindaj estas K. Gindvilene, G. Kediene, N. Paŭlaskajte k. a. Ja dank' al ilia senlaca zorgo en 1970 j. estis aranĝita Balta Esperanto-tendaro (BET-XII) en urbo Kretinga. Ĝi faris tre bonan impreson al ĉiuj ĉeestantoj.

Kaj ĉi-foje, eksciinte pri la jubileo de tiu ĉi aktiva Rondeto, ni ĉiuj agrable akceptis

la inviton. Vere, la renkontiĝo pasis tre gaje, interese, bonhumore, ĉar la mastroj sukcesis organizi ĝin tiel, kiel nur kretlinganoj scipovas.

Ni, ĉiuj ĉeestintoj, elkore bondeziras al kretlinganoj pli da fortoj kaj daŭran sukceson kaj prosperon!

Vladislav Viršila

INTERURBA RENKONTIĜO DE SOVETAJ ESPERANTISTOJ

Tre bonsukcesa renkontiĝo okazis inter la membroj de Esperanto kluboj „Verda Horizonto“ (urbo Ust-Kamenogorsk) kaj „Oazo“ (urbo Barnaul). Duafoje ni kolektiĝis sur la altaĵon Montaro Uljbinka. La unuan fojon — en 1969. La impresoj pri tiu pitoreska loko estis tiel bonaj, ke ĉiuj revis viziti ĝin denove. Kaj jen — post zorgeme pripensita programo fare de la du klubaj estraroj la renkontiĝo efektiviĝis.

La 30-an de aprilo okazis la interkona vespero. La malfermo de la renkontiĝo mem — la matenon de la Unua de Majo, la plej granda kaj la plej amata festo de internacia solidareco de la laboruloj el la tuta mondo. La parolon havis la klubaj prezidantoj Vladimircv Jurij kaj Anohin Boris, kiuj rakontis pri la laboro de siaj kluboj.

Sed ĉu povas esti festo de la Unua de Majo sen manifestacio? Ne! Ankaŭ tion prizorgis la organizantoj de la renkontiĝo. Du kamaradoj el la du kluboj — Golovnin Viktor kaj Dimitriadi Vasilij — respondecis pri tiu grava ero de la programo. Ĝuste je la 10 horo la manifestacio komenciĝis. La du kamaradoj vigle salutis la marŝantojn (evidentiĝis, ke ili estas bonaj oratoroj!) Responde — entuziasmaj E-kantoj. Dum la tuta tago la esperantistoj sportis, fotis, kantis novajn kantojn, prezentis teatraĵetojn. Lena Brjuhanova gvidis turisman marŝon laŭ la ŝoseo „Orienta Ringo“. Ĝi daŭris tri horojn kaj plezurigis ĉiujn pro la pitoreska naturo, sub la sunkaresoj.

La „Gaja Vespero“ estas tradicia ero de similaj renkontiĝoj ankaŭ nun. Estis prezentita bona koncerto de barnaulaj kamaradoj. Sonis gitaroj, ŝercoj, rido — neniu estis malgaja dum tiu ĉi vespero. La dancoj finiĝis jam post noktomezo.

La 2-an de majo, antaŭ ol forveturi (Barnaul kaj Ust-Kamenogorsk disigas 10 horoj de pervagonara veturado), oni faris komunajn fotojn. Por rememoro. Post tio ĉiuj kantante „Rememoroj aperas pri la tagoj pasintaj“ eniris la aŭtobuson.

Ĝis revido, karegaj geamikoj! Ĝis la sekva renkontiĝo!

Valentin Ĉembarisov
Ust-Kamenogorsk

KONFERENCO EGALA AL KONGRESO

Je la 27—29 de majo 1972 okazis la Dua Nacia Konferenco de la Esperantistoj en Germana Demokratia Respubliko. Ĝi estis impona kaj reprezenta: partoprenis ĉirkaŭ 200 esperantistoj — delegitoj el ĉiuj distriktoj de la lando. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de diversaj ŝtataj instancoj, kio substrekis la gravan karakteron de tiu ĉi Esperanta evento. Fakte la Konferenco egalas al esperantista kongreso. Ĝian laboron partoprenis ankaŭ reprezentantoj el la naciaj E-organizaĵoj de Bulgario, Hungario, Pollando, CSR kaj USSR.

La prezidanto de la Centra Laborrondo de Esperanto en GDR, Rudi Graetz, faris detalan raporton pri la pasinta organiza periodo kaj pri la antaŭstarantaj taskoj. Raporton faris ankaŭ Hans Eichorn — pri la junulara E-movado en GDR. Sekvis salutparoloj de delegitoj de diversaj esperantistaj komitatoj, kiuj samtempe raportis pri la sukcesoj en sia organiza, kulturkleriga kaj instrua laboro. Gravan salutparolon faris la vicprezidanto de la Germana Kulturligo, en kies kadro funkcias la Centra Laborrondo de Esperanto. Parolis ankaŭ reprezentantoj de la neesperantistaj organizaĵoj, kiuj apelaciis pri komuna kunlaboro.

Estis elektita nova nacia E-komitato frunte kun Rudi Graetz — prezidanto kaj Detlev Blanke — sekretario.

Nin, la alilandajn gastojn, oni ĉirkaŭis per granda atento kaj estimo. Dum la tuta tempo la germanaj amikoj certigis por ni oportunajn loĝejojn, transporton kaj manĝadon.

Por ĉiuj konferencanoj estis organizitaj tre interesaj ekskursoj. Neniam ni forgesos la viziton al la lokoj, kie okazis la lasta kunsido de la CK de Germana Komunista Partio sub la prezido de la granda filo de la germana proletaro, la elstara revoluciulo-komunisto Ernst Thaelman (Telman), antaŭ ol venis la germana faŝismo. La ŝipekskurso sur la rivero Ŝpree kaj sur ĝiaj kanaloj lasis en nia memoro neforgeseblajn impresojn. Ni ne parolu pri la vizito de la Berlina Operejo, de la rimarkinda Berlina Televida Turo k. a.

En la nomo de la bulgara delegacio mi plei kore dankas al vi, karaj germanaj amikoj kaj fratoj!

Nano Nanov
prezidanto de la Sofia Esperanto-Societo
„Maksim Gorkij“

**Ne atendu la 10-an de decembro!
Tuj abonu „Bulgaran Esperantis-
ton“! Abonigu aliajn!**





„LES PAUVRES BULGARES“

de Prodan Prodanov

Persekutataj de la eklezio kaj de la regantaj potenculoj, granda parto de la bogomilanoj* forlasis Bulgarion kaj serĉis trankvilan vivadon en aliaj landoj. Ili direktis sin okcidenten. Peza kaj turmentplena estis la vojo de la elmigrintoj. Ili trapasis diversajn landojn, kaj ĉie oni renkontis ilin malame.

Tro lacaj, preskaŭ elĉerpitaj, la bulgaroj atingis la francan landon kaj petis gastigon de la franca reĝo. Lia reĝa moŝto montris sin bonkora kaj tolerema. Li permesis al la bulgaroj establi sin en la sudaj partoj de lia ŝtato. La bulgaroj obeis al la reĝa volo kaj baldaŭ ili ekvivis en paco kaj kompreno kun la francoj. Posttempe la novaj civitanoj estis nomitaj kataroj, albigojoj, bugroj aŭ simple bulgaroj.

¹ *Bogomilanoj* (adeptoj de popo Bogomil) — socia-religia instruo kaj movado en la X jarcento en Bulgario, kiu disvastiĝis en aliajn landojn: Bizanco, Serbio, Norda Italio, Suda Francio k. a. La bogomilanoj batalis kontraŭ la feŭdisma sociordo kaj la oficiala eklezio — por pli da socia justeco kaj egaleco.

Iun nokton suspekto kaj timo obsedis la reĝon: li pentis pri la konsento, donita preskaŭ senpripense al la bulgaroj. Tio forpelis de li la dormon. La sekvan tagon liaj konsilantoj plifortigis lian timon, dirante al li, ke tiuj bulgaroj portas kune kun si la fermenton de ribelo kaj malordo.

La reĝo ordonis al siaj armetrupoj likvidi la bulgarojn.

La armeanoj plenumis la ordonon akurate. La bulgaroj estis senkapigitaj.

Pli kruelan masakron ĝis tiam la mondo ne konis. La nearmitaj francoj, kiuj loĝis en tiu regiono, estis animskuitaj pro teruro. La kruelaĵo lasis profundan spuron en la memoro de tiuj honestaj kaj kvietaj kampuloj.

... Oni devigis ilin enterigi la buĉitojn en komunajn kavojn. La bonanimaj francoj ĵetadis la kadavrojn en la kavojn kaj parolis komplete: „Les pauvres bulgares! . . . Les pauvres bulgares! . . .“ (La kompatindaj bulgaroj!).

Iom post iom tiu ĉi eldiro iĝis popola esprimo. Multaj jarcentoj forpasis de tiam, tamen la esprimo daŭre okupas sian lokon en la franca folkloro. Kaj ĝi estas la plej trafa karakterizo pri la mizera situacio de kiu ajn.

Estis 1939. La Civitana Milito en Hispanio iris al sia fino. Unu post alia la respublikaj milittrupoj kapitulacis. La falangistoj triumfis. Parto de la fremdlandaj volontuloj, kiuj defendis la Respublikon, estis evakuitaj per sipoj. La ceteraj, kiuj ne sukcesis fari tion, retiris sin en la Pireneojn kaj fuĝis al Francio. Survoje ili ofte batalis kontraŭ armitaj bandoj de la kruelaj venkintoj.

Kvaropo da bulgaroj, gvidataj de la sofia presisto Niko Levterov, transpasis la landlimon kaj ekspiris libere! Ĉiuj havis la feliĉan senton, ke ili

sukcesis eskapi el la buŝego de sang-
avida besto.

La grupeto daŭrigis la vojaĝon. Ili preterpasis mirinde belajn lokojn, kiujn la naturo kreis en momento de verva inspiro. Altaj akrapintaj rokmasivoj, viglaj torentoj, ŝaŭmantaj akvofaloj kaj kristale puraj lagoj entuziasmigis ĉies koron. . . La fuĝintoj tamen ne havis okulojn por ili. Sendormado, tro-laciĝo kaj terura malsato turmentis ilin. Ĝis hieraŭ batalkampaj herooj, hodiaŭ ili estis sengloraj vagabondoj.

La reĝimo en la francaj tendaroj por enmigrintoj estis por ili tute nekonata, sed ĝi timigis ilin. Kaj la grupeto decidis daŭrigi sian nevolan migradon.

Iun tagon Levterov disdonis al ĉiuj po iom da sukero kaj la nutraĵo elĉerpigis.

Ili provis diversajn rimedojn por havigi al si nutraĵon. Unue per fiŝkaptado. La ruzaj trutoj tamen neglektis la primitivajn fiŝhokojn. Ili daŭrigis la akrobataĵojn en la malvarmaj akvoj kaj per siaj gracie viglaj movoj nur vekis inciton en la malplenaj stomakoj de la malbonŝancaj fiŝkaptistoj.

Niaj herooj manĝis bakitajn, sed nesalitajn helikojn, fagofoliojn, diversajn radikojn kaj herbojn. . . La nutraĉo kaŭzis al ĉiuj vomemon.

La malsato senprudentigis ilin. Iu deliris pri taso da lakto. Alia — pri stufita viandaĵo kaj karbonado. Tria, iama vegetarano, sopiris fungosupon kaj sian ŝatatan raguon kun fromaĝo. . . La uniforma vestaĵo de ĉiuj iĝis ĉifona. La nerazitaj vizaĝoj — magraj kaj sovaĝaspektaj!

Finfine la grupo ne eltenis. Generalo „Malsato“ estis pli timiga ol Franko.

Ili decidis almozi en la vilaĝoj . . .

En la grupeto nur Levterov estis „multlingva“. Li scipovis hispanan, iomete francan kaj Esperanton.

Oni komisiis al li gvidi la almozpetan „operacion“.

Ĝis nun la grupeto intence evitis

kontakton kun francoj. Nun ĝi kuraĝe almarŝis laŭ la kurba montara vojo, kiu serpentumis al nekonata vilaĝeto. Atinginte la celon, ili elektis izolitan domon en la vilaĝando. En la korto virino en estiminda aĝo nutris dombirdojn.

Kiam la barbvizaĝaj ĉifonuloj eniris la korton, la virino spertis ekstreman timon. Ŝi nevole faliĝis la grenople-nan ladskatolon kaj provis helpkrii. La voĉo tamen kvazaŭ frostiĝis en ŝia gorgo.

— Bonjour, madame!¹ Kia belega vettero, ĉu ne? — Levterov diris afable kaj provis rideti.

Nenia respondo.

— KREDU min, sinjorino! Malbonuloj ni ne estas. Nur malsataj. . . Mi petas vin: donu al ni panon! Monon mi ne havas, tamen mia horloĝo valoras — Levterov elpoŝigis bonegan horloĝon kaj proponis ĝin al la maljunulino.

Ĉar li, la kompatinda ne kapablis almozi.

La poŝhorloĝo estis por Levterov pli ol kara. Ĝin donacis al li aŭstra kamarado, kiu jam kuŝis en la tero de Katalunio. . . .

La virino tamen faris rifuzan geston kaj eniris la domon. Ŝi elportis dome produktitan panon kaj donis ĝin al Levterov. Li tuj dividis ĝin egalparte kaj disdonis la pecojn al siaj kamaradoj. Ĉiuj formanĝis siajn porciojn kun enviinda apetito.

— Les pauvres bulgares! — diris la virino kortuŝite.

La neatendita eldiro surprizis Levterov.

— Pardonnez moi, madame!² Sed kiel vi komprenis, ke ni estas bulgaroj? — li demandis ŝin.

— Vi, bulgaroj!? Oh, mon dieu!³ La kompatindaj freneziĝis pro malsa-

¹ Bonan tagon, sinjorino!

² Pardonu min, sinjorino!

³ Ho, dio mia!

(Sekvas sur. p. 21)





ROMANCO PRI JOSE SANCHÁ, LA PENTRISTO

de Veselin Hančev

Jose Sancha¹,
Jose Sancha,
mi vin serĉas por paroli
kun vi,
kara Jose Sancha,
koramiko, blankiĝinta
pro la nigraj stacidomoj
kaj pro novaj renkontiĝoj,
dudek kvin plen-plenajn jarojn
tra la mondo veturanta.

Diru:
kial vi ne povas
pentri pli precize?
Diru:
kial pentras vi en miaj domoj el Trakio
jundancantojn de flamenko?
kaj madonojn,
Jose Sancha?

Kial vi la Nordan Maron pentras en koloro
ruĝa,
blua, roznuanca, verda?
Ĝiajn virojn kun okuloj
plenaj je ciganmalĝojo?

¹ Jose Sancha (legu: Hose Sanĉa) — progresema hispana pentristo, vaginta longe tra la mondo. Kelkajn jarojn li laboris ankaŭ en la bulgara Nacia Teatro kiel dekoraciisto.

² Flamenko — populara hispana danco.

³ Mantilo — larĝa punta tuko, uzata de hispanaj virinoj kaj kovranta kapon kaj ŝultrojn.

Diri:
kial pentras vi ĉi tiujn taŭrojn apud Sejno,
tiujn orajn kastanjetojn
sur ĉielo varsovia?

Kial
blankajn germaninojn vi pentradas en
nigraĵo,

kun la ruĝmantil³ de Karmen?
Kaj pro kio flamas rozoj
sur iliaj brustpintetoj?

Kial
pentras vi cipresojn, olivarbojn kaj citro-
nojn
ĉe betuloj el Ruslando?

Kial
vi en okulpar' de mia filineto pentras
du senfinajn noktojn,
Sancha,
du ponardojn el Toledo?

Jose Sancha,
Jose Sancha,
vi silentas.
Blankiĝinta
pro la nigraj stacidomoj
kaj pro novaj renkontiĝoj
dudek kvin plen-plenajn jarojn
tra la mondo veturanta.
Vi ĉe ĉiu fremdstacio
trovas vian Hispanion,
vi ĉe ĉiu renkontiĝo
vidas vian Hispanion,
vi pentradas en la mondo
sole vian Hispanion. . .

Mi okulojn viajn kisas,
Jose Sancha,
Jose Sancha!

El la bulgara: Ivan Dobrev

to! — diris la maljunulino preskaŭ
plore.

— Parol d'honneur, madame!⁴ Ni estas
bulgaroj, kaj nia patrolando — Bul-
gario! — rebatis vigle Levterov.

— Sen ebriulaj ŝercoj, sinjoro! La
bulgaroj estis murditaj antaŭ multaj
jaroj. . . La legendon pri ilia ekstermo
mi aŭskultis de mia karmemora avino! —
diris la bonkora virino.

Kaj vorto post vorto, apenaŭ kompre-
nata, ŝisciiĝis al lila historion, kiu estas pri-
skribita en la komenco de tiu ĉi rakonto.

⁴ Honestan parolon, sinjorino!



UNUA DE MAJO

de Asen Grigorov

Heliĝis.

Triumfas la flora printempo.

Foriris glacio,

malvarmo,

malgajo.

Homaro! Eksonis la signo de l' tempo,
alvenis Unua de Majo!

Liberaj ni estas — ni, tuta popolo.

En densaj taĉmentoj
sur strato

kaj placo

ni marŝas kun firmaj decido

kaj volo

al hela estonto kaj paco.

Vi, negro el Kongo,

prolet' portugala,

kaj vi el Angolo,

kaj vi el Malajo,

antaŭen sub ruĝa standardo batala, —
alvenis Unua de Majo!

Saluton tutkora al vi, vjetnamo,
nuntempa Davido,

heroo

kaj frato!

Vi venke rebatu per kuglo kaj flamo

Usonon —

la Fi-Goliaton!

Saluton al vi,

festotag' de l' laboro,

de paco,

de firma batal-solidaro!

Vin baldaŭ renkontos kun ĝojo kaj gloro
la tuta libera homaro!

Proletoj el tuta terglobo,

unuigu!

Jam batas la horo de l' lasta batalo.

Eklumis la tago de nia feliĉo.

Alvenis Unua de Majo!

LA PRINTEMPO

de Mihail Ŝekergiev

Ĉiumatene mi jetas rigardon tra la fenestro al Vitoŝa-monto kaj ĉiumatene mi konstatas, ke la suno senindulge disŝiras la neĝan kovrilon kaj en la valon potence, pompe kaj alloge alpaŝas la printempo.

Ĝi venas kun la cirkulantaj sukoj en la arboj, kun la bunteco de la floroj kaj kun la plenakvaj torentoj. Matene la rosgutoj brilas sur la herbo, la talpo eligas montetojn da grundo kaj la lacertoj varmigas sin sur la rokoj. Iujn tagojn pluvas, kaj tiu printempa pluvo forportas la putrantajn sekajn foliojn. Neatendita tempesto rompas la traboritajn de vermoj pinojn, kaj ili falas inter la junaj arboj, kiuj sopiras la lumon.

Kiel nevidebla sorĉistino la printempo tuŝas ĉies animon:

— Hej vi, kun la ĉagrenitaj okuloj, levu la kapon kaj renkontu min ĝoje! Malfermu vaste la fenestrojn kaj spiru profunde la freŝan aeron. Mi estas la printempo, kiu purigas kaj renovigas la naturon, samkiel la sufero purigas kaj hardas la homan animon. For la malesperon!

Poste la printempo vagas tra la urbo, salutas la hirundojn, starantajn sur la telefonfadenoj, la cikoniojn sur la kamentuboj kaj la sciurojn en la arbaro.

La ĉagrenita homo sentas tiujn ĉi printempajn impulsojn, eliras el sia mal-luma ĉambro kaj iras al la naturo. Atinginte la torenton, li haltas por aŭskulti ĝian murmuron, senbrue kaŝas sin sub la arbon, sur kiu kantas najtingalo, por ĝui ĝiajn mirindajn melodiojn, aŭ karesas la blankajn petalojn de la ĉerizarboj.





Reveninte emociplena hejmen, li ekstaras antaŭ la spegulo kaj observas sin.

— Ne, ne estas vere, ke miaj haroj jam griziĝis. Ankaŭ la sulkoj de mia vizaĝo estas apenaŭ rimarkeblaj — flustras li.

La agrabla sento kaptas lin. Ho, la memtrompiĝo estas tiel dolĉa kaj signifas printempon!

La printempo estas la sezono de koncipiĝo kaj gravediĝo. Graveda estas la tero, gravedaj estas la arboj, la semoj, gravedaj estas la nuboj. La marfiŝoj eknaĝas je grandaj mikrokolonoj al la buŝoj de la riveroj por fraĝi. Ĉu vi ne rimarkis, ke la leĝo de la memkonservo de la gento montriĝas en plena forto dum tiu ĉi sezono?

La printempo estas ankaŭ la sezono de la bela amo. La plej mildaj karesoj, la plej sinceraj promesoj estas donataj kaj eldirataj tiam. La deksejaraj gejunuloj sentas, ke ia nekonata alarmo regas ilian korpon, iliaj sonĝoj estiĝas maltrankvilaj, ili vestas la vizaĝon de la dezirata persono en plej belaj trajtoj kaj sopiras al ĝi. Por la unua fojo ili sentas la amvekiĝon.

Ĝenerale la amo estas printempo en la homa vivo.

La printempo havas multajn vizaĝojn. La batalo por libero kaj venko estas printempo, la operacio de la lerta hi-

rurgo estas printempo, ĉiu invento de la sciencistoj estas triumfo de la homa menso kaj printempo. Ĉar la printempo estas naskaj penoj kaj doloroj. Sen simila printempo la homa civilizacio ne moviĝus antaŭen.

La printempo estas ankaŭ espero.

La knabineto, kuŝanta malsana en la lito, levas sian kapon, rigardas tra la fenestro pepantan birdon sur la saliko kaj diras:

— Panjo, vi promesis en la vintro, ke mi resaniĝos, kiam venos la printempo. Ĝi jam venis, panjo, kaj mi baldaŭ plukos florojn en la ĝardeno, ĉu ne?

La patrino karesas la varman frunton de sia malespere malsana filineto, kaj du larmoj aperas en ŝiaj okuloj.

Ĉu vi rimarkis, ke la printempo havas siajn ŝatatajn kaj preferatajn kolorojn? La verdan — kiel ĝeneralan fonon, la rozan, poste la blankan, la flavan. Ili dancas en la disflorantaj pomujo kaj prunarbo, en la persikujo, en la flavaj safranoj kaj leontodoj. Mi ŝatas tiun ĉi buntan palitron de la naturo.

Dum la printempaj matenoj mi leviĝas frue kaj irante al la oficejo trapasas la parkon. Ĝia freŝa atmosfero plialtigas mian humoron, kaj sur la stratoj mi jam kantetas mallaŭte. La preterpasantoj mire rigardas min kaj flustras:

— La kompatinda! Ŝajne ĉe li io ne estas en bona ordo.

— Ne, — respondas alia. — Eble io gajiga okazis en lia vivo. Eble lia edzino naskis filon.

La tuta naturo dum la printempo moviĝas, transformiĝas, bolas. Kaj ĝuste tiam ni lernas pli bone ami la sunon, la aeron, la akvon, la teron.

Printempo, printempo, mi amas vin, ĉar vi estas espero, forto kaj vivo!



KOMUNISTOJ

de Mladen Isaev

El plenmano da homoj — nun jam milionoj!
Al la celo marŝadas harditaj kolonoj.

Super ter' mateniĝas. Kaj fiere, insiste
ĉiulingve nun sonas la vort' „komunistoj“!

Ekrigardu reen: tra l'nigra mallumo
jen leviĝas la ŝtorma Pariza Komuno.

Barikadoj sur placoj antikvaj fumadas,
komunanoj kun kantoj batalaj mortadas. . .

En profunda obscuro troviĝas Rusio,
furiozas kirlventoj en vast' siberia.

En kabano eta Lenin historion preparas,
el sub lia skribil' la estonto spiradas. . .

Petrograd'. La Revoluci' el „Aŭroro“
per fajro parolas pri l' homo honoro. . .

En frostegaj neĝblovoj kun ventoj tempestaj
komunistoj konkeras palacojn ŝtatestrajn.

Tra l'stepoĵ varmegaj jen flugas skadronoj —
ilin kiel stepaglo kondukas Budjonij.

La palacojn berlinajn minacas atako
de l'gvidata de Libknecht kaj Rosa „Spartako“¹.

Ĉie, ĉie promenas la Revolucio. . .
Ĉirkaŭprenas giganta aŭror' Hungarion.



TURISTO — ESPERANTISTO

de Simeon M. Simeonov

Estis li turist' pasia
kaj tra patrolando sia
veturadis, piediris,
ties ĉarmojn tre admiris,
ĝuis ege la pejzaĝojn,
vidis urbojn kaj vilaĝojn...
Tamen kiam li renkontis
fremdlandanojn, ĉiam hontis,
lingvon fremdan ne sciante,
kaj bedaŭris li konstante
pro la fakto tre ĉagrena,
malagraba, ege ĝena.

Iun tagon, dum ekskurso,
aŭdis li pri stranga kurso —
kurs' de lingvo nova, bela,
komprenilo plej modela:
dua lingvo post gepatra,
lingvo taŭga kaj ekzakta
por amika korespondo
kaj vojaĝ' tra l' tuta mondo.
Senprokraste li decidis
lerni ĝin kaj ekrapidis.
En la kurso diligente
studis li temperamente
kaj al la sukcesa fino
baldaŭ venis per obstino —
baldaŭ esperantistiĝis,
kun amikoj kontaktiĝis
el la fora eksterlando
per la lingvo Esperanto...

Nun li estas tre feliĉa —
homo je amikoj riĉa.
Energie kaj sen laco
luktas li por monda paco,
helpas per la lingvo kara
por la bono tuthomara.



Sed ekhurlas subite kruelaj luparoj —
kuŝas ĉere dronintaj en sangon hungaroj. . .

La sablar' de Ogosta² fariĝas tombejo
de herooj, falintaj en lukt' epopea. . .

Sed la marŝo grandega ne haltas, ne haltas:
komunistoj, falintaj batale, ne mortas!

Kaj naskiĝas, ekstaras ilia novŝtato
kiel suna oazo — potenca kaj frata.

Reekmarŝas jen la komunistoj tra l' stepoj,
kie iam flugadis skadronoj impetaj.

Arbozonojn kampŝirmajn en step' ili plantas
kaj konstruas uzinojn kaj urbojn gigantajn.

Kaj eĉ mortajn dezertojn, ardegon spirantajn,
transformadas ili en ĝardenojn florantajn. . .

Ĉiuloke sur tero nun ili marŝadas.
Ilin ligas plej varma la vort': kamaradoj!

Proksimiĝas jam tempo revata, grandega,
kiam sur la tero komunismo ekregos. . .

El plenmano da homoj — nun jam milionoj!
Al la celo marŝadas harditaj kolonoj. . .

Super ter' mateniĝas. Kaj fiere, insiste
ĉiulingve nun sonas la vort' „komunistoj“!

El la bulgara: Tempeste

¹Libknecht kaj Rosa (legu: Libknecht kaj Roza) —
gvidantoj de la revolucia organizo „Spartak“, kiu en
1918 ribelis kontraŭ la imperiisma milito de Ger-
manio. Estis mortigitaj de la germanaj kontraŭrevolu-
ciuloj je la 15 de januaro 1919.

²Ogosta — rivero en nord-okcidenta Bulgario,
apud kiu la faŝistoj mortpafis milojn da komunistoj,
partoprenintajn en la unua en la mondo kontraŭ-
faŝista ribelo en septembro 1923.

MORGAŬA TAGO

de Elisaveta Bagrjana

Pri vi aŭguras nek la intelekto, nek la koro,
por ni vi estas ĉiam vualita vivmister'.
Ho, diru: kiam komenciĝas vi, en kiu horo?
Kaj ĉu denove iam vi aperos sur la ter'?

Homaro tuta staras kun rigard' al vi fiksita,
petante aŭ minacproteste kontraŭ la destin'.
De vi atendas malsatanto esti satigita,
malfeliĉul' de vi atendas feliĉigi lin. . .

Ĉu reaperos vi senŝtorme, kiel la aŭroro,
aŭ vi ektondros kiel bombo super tuta mond'?
Ne scias ni, sed nur atendas kun esper'
en koro, —
morgaŭa tago, — ĉiam nova, juna vivoond'

El la bulgara: Simeon M. Simeonov



DISKUTADO PRI LA POEZIO

de Orlin Orlinov

En la salon' okazis diskutado.

Sidante duonronde, en grupetoj,
laŭ pozic'oj kaj konceptoj,
varmege ĉiuj diskutadis,
ĉu la poetoj devas verki
en form' libera siajn versojn
aŭ preme meti siajn pensojn
en tiujn kvarangulajn ĉelojn
de la antikva jamb' de Puŝkin. . .

„La verso — pura fonto,
kaj sent' — la poezio,
radia horizonto,
alvoko, art', magio. . .“ —
ĝis sveno skandis iu.

„Hej, televidiloj!
Hej vi, bovoj grizaj!
Ihu! Ho-po!
Saltu, ŝopo!¹
Venas komunismo
en surprizaj
briloj. . .“ —
vicigis vortojn dua.

„Pensoj miaj, atom-mergiŝipoj,
de l' komunismo avangardo glora.
Okuloj miaj — duonkondukiloj.

¹ŝopo — loĝanto en la regiono de Sofio

„La kor' — nuklea reaktoro...“ —
jen flustre raciumis tria.

„Ho vi, linioj kurbaj, ĝenaj,
geometriaĵoj projekcioj!
Vi ankaŭ estas ide-plenaj,
Leninaj kaj revoluciaj —
cerbumis nova Arkimedo. —
Abstrakta estas la percepto
kaj ĉiu sento — abstrakcio.
Se vi Igrekon hejmakceptas,
li tamen estos ne la sama,
sed nur simbolo, dimensio!...“

Ho, mirindaĵo!

La salonon
eniris kvara dimensio:
knabin' — arbido sveltgracia,
kun ruĝa eta trikĉapelo,
kun vangoj — peonioj helaj,
kun haroj — duonkondukiloj,
kun mamoj — avangardoj viglaj,
kun gamboj antigeometriaĵoj
kaj kun okuloj — panjo mia! —
nukleaj ĉenaj reakcioj.

Tuj lirikiĝis modernistoj
kosmiĝis jen la realistoj,
komplikis pensojn la filistroj
kaj ĝuste la tradiciistoj,
eĉ super-plus-avangardistoj —
foliojn miksis ĉiuj „istoj“.

La plenaĝuloj blankhararaj
sonetojn plektis senerarajn;
senaĝaj poetinoj diris:
„Ah, kiel vi, junec', foriris?“

La kritikistoj — ekspoetoj
(plektintaj dum junec' versetojn), —
sekrete rimis — tasko grava,
sed ties rimoj per la „rava“
finiĝis kaj kun tristo certa,

ĉar rimo, rimo, frato brava,
ĝi ankaŭ serĉas majstrojn spertan.
La prezidanto, kiu zumis,
solvante taskon tre provokan, —
en unu veturilon jungi
la aglon, kankron kaj ezokon,
forĝesis devojn kaj memsenton,
kaj ekflustretis sub sordin':
„Mi rememoras la momenton
mirindan — vi prezentis vin...“*

Aŭskultis la knabin' silente,
kaj sur la ruĝa ĉapeleto
neĝeroj brilis rosargente,
kaj pompe kronis ĝin gutetoj.

Amikoj, ĉiuj jam kontentas.
Ĉu iu la parolon prenos?
Ni devas fermi la kunvenon...“
— Jes, ni konsentas....

— Ni konsentas...
Kaj kiu havis tempon multan
daŭrigi la disputon stultan?
Ja kun la bela junulino
eniris tuj la viv' senfina —
reala, varma kaj sentata,
konata kaj ne tre konata,
amara iam, ĝojimpona,
la vivo, kian ĝin ni konas,
de kredo plena, de deziroj,
de am', malĝojoj kaj inspiroj,
de hum' kaj voko ekzotika,
majesta, nobla kaj prospera,
senfina kiel vers' libera
kaj hejma kiel vers' klasika.

El la bulgara: Stefan Kiraĝiev

* Versoj de Puŝkin:

Я помню чудное мгновенье,
передо мной явилась ты...

(„А. П. Керн“)

ARBIDEJO

de Stojan Kostadinov

Foje nia ĉiam gaja instruistino sci-
igis al ni, la lernantoj de la tria klaso:
— Morgaŭ posttagmeze ni vizitos
la urban arbidejon. Ĉiuj devas kolek-
tiĝi en la lernejan korton antaŭ la
dekkvara.

La sekvan tagon je la fiksita horo
ni staris en la lerneja korto.

— Atenton! — laŭtvoĉe diris la
instruistino. — Ĉiuj viciĝu po du! Nu!
Rapide, rapide! . . . Cveta, gvidu la

kolonon! Al la urba arbidejo — ek!

La kolono ekmoviĝis. Post nelonge
ni estis ekster la urbo. La marŝado
kontinuis laŭ asfaltita ŝoseo kaj ni ĝuis
la verdan kamparon kaj freŝan prin-
tempan aeron.

Jen ni alvenis. Ĉe la enirpordo nin
atendis la administranto de la arbi-
dejo — la forstisto Vâlcan Zahariev.
Altstatura, impona, li staris kiel koloso
ĉe la enirejo kaj kun rideto salutis nin:





— Bonan venon! Bonan venon!
Poste diris averte:

— Nun vi eniras la arbidejon, sed aŭskultu, karaj geknaboj, vi devas gardi la plantojn, nenion vi devas deŝiri de ili, eĉ unu folion! Nu, bonvolu eniri!

Kaj ni eniris. Sub lia gvido ni ĉirkaŭpasis ĉiujn bedojn plantitajn per diversaj specoj da arbidoj, kiujn li montris al ni. De nia flanko ni surŝutis lin per demandoj: pri la nomoj de l'arbidoj; ĉu tiu aŭ alia speco estas taŭga por industriaj celoj; ĉu ilin oni plantis el semoj; ĉu jen ĉi tiuj povas kreski altaj, dikaj arboj, aŭ ili restas arbustoj; kien kaj kiam oni transplantas ilin — kaj multaj aliaj demandoj, al kiuj li afable kaj detale respondis.

Jen antaŭ ni granda plantkovrita surfaco. Montriĝis, ke tio estas lia ŝatata robinio, speco de blanka akacio. La forstisto longe rakontis al ni pri la kvalitoj de la robinio, pri ĝiaj belegaj mieldonaj florgrapoloj.

Poste ni vizitis la plej malproksiman angulon de la arbidejo, kie kreskas la unua plantita en la arbidejo maljuna arbo — grandega majesta robinio. Tie troviĝas negranda spaco, plantita per

ordinara herbo, sur ĝi — kelkaj benkoj por ripozo. Lacigitaj ni tuj sidiĝis sur ilin kaj sur la herbejon. Kamarado Zahariev ekstaris en la ombro de la robinio kaj ekparolis al ni:

— Mi tre ŝatas ripozi en la ombro de tiu ĉi majesta arbo. ... Sed iun matenon nia arbidejo vekigis tute ornamita de arĝentblanka prujno. Ĉio estos rigidiĝinta. Vi jam konjektas. Tio okazos aŭtune, kiam la prujno ĉion blankigos. Tiam nia robinio estos en nova ornamo. Ĉe la unuaj sunradioj ĝi brilos, brilos. Kaj ne nur ĝi, sed ĉio ĉirkaŭe — la tuta arbidejo — brilos per la diversaj koloroj de la ĉielarko. Tiuj matenoj ĉe ni estas mirindaj, fabelaj, sed tio daŭras tre mallonge. La prujno sub la varmaj sunradioj rapide degelas kaj la flaviĝantaj frostvelkintaj folioj unu post la alia deŝiriĝas de sia patrino, la robinio, kaj malrapide falas teren. Finiĝas jam ilia vivo. Sed surbaze de la folioj sur la branĉoj antaŭ la veno de l'aŭtuno formiĝas etaj burĝonoj. Ili estas plenaj de nova vivo kaj ne timas la prujnon. La burĝonoj estas bone vestitaj de etaj brunaj skvametoj, gardantaj ilin eĉ kontraŭ plej kruda malvarmo. La burĝonoj ne frostiĝas. Ili estas pretaj por nova vivo dum la venonta printempo. El la burĝonoj elkreskos novaj folioj kaj denove nia robinio estos tiel bela, kiel nun.


Kamarado Zahariev finis siajn klarigojn. Nia instruistino dankis al li, premante forte lian manegon.

Gajaj, kun kantoj kaj babiloj, ni reekmarŝis al nia lernejo. Kaj jam en tiu momento ni revis denove gastoj al la arbidejo en la ombro de la majesta robinio.

Atentigo!

En la literatura parto de tiu ĉi numero la fotoj, akompanantaj originalaĵojn, prezentas la aŭtorojn, ĉe tradukaĵoj — la tradukintojn.

Hristo Jasenov
1889—1925



* * *

Donu helpon por tranaĝi marojn grandajn ne naĝitajn;
kaj por vidi la miraklojn de la forfremdula far';
donu sunon por varmigi kampojn froste glaciitajn,
al mi donu la printempan sunon de l' ĉiela klar'!

Donu al mi la kareson de animo sopirata
kaj la sablan trombon de l' dezerto muta kaj sen fin',
donu al mi dian kredon al sekreta mond' beata
por ne esti senespera kaj de l' peko gardi min.

Min karesu kiel panjo, kiel sonĝ' de mia revo —
ja mi serĉas la elspiron varman de plukita fl or',
serĉas mi lazurajn bordojn kaj la ŝirmon de la mevo
por forfilugi super marojn en renkonto de l' aŭror'.

Kaj se iam ekmalhelus ŝtorme la senlima spaco
kaj ekserĉos patrolandon por azil' senhejma mi,
vi malfermu viajn larĝajn pordojn de la korta placo
kaj enverŝu al mi vinon de brilanta amrad'!

Donu helpon por tranaĝi marojn grandajn ne naĝitajn
kaj por vidi la miraklojn de la forfremdula far';
donu sunon por varmigi kampojn froste glaciitajn,
al mi donu la printempan sunon de l' ĉiela klar'!

El la bulgara: Violin Oljanov



NEFINITA SIMFONIO
de Damjan Damjanov

Ŝuberton kvarmane,
Ŝuberton pianis la du.
Li ofte rigardis ŝin ame.
La blanko de ŝia vizaĝ'
dronadis malhelan glazuron
de l' olda brilanta plan'.

En nokto printempa, lazura
la vivo ekfloris en am'.
Kaj ili sin kisis senvoĉe,
ekzakte en takto dek du
kaj ili kisadis sin dolĉe.
Ŝuberto rigardis la du...

Sed venis milito. En sombro
ekfajfis alarme signal'.
Milito ŝlosfermis per tondro
la tristan pianon en hal'.
Ekiris li simpla, senvorta,
kaj amon surdigis la marŝ',
pianon — nigraj la botoj.
Ŝuberto fariĝis miraĝ'.

Kaj kiam li barba revenis,
malplenis maniko de l' jak'.
La sanga milito forprenis
la brakon de li en atak'.

La koro fariĝis jam kruda —
soldata malmola kor' nun.
Kaj iam Ŝuberton kunludis,
Ŝuberton kvarmane la du.

*El la bulgara:
Nikola Plev*





DAO ANH KHA*

Naskiĝis la 15-an de decembro 1923 en provinco Quang Tri (centra Vjetnamio). Frua orfeco, memlernado. Partoprenis la Aŭgustan Revolucion (1945) kaj la kontraŭfrancan rezistadon (1945—1954). Post la venko ĉe Djen Bjen Fuiris norden.

De 1946 — ĉefredaktoro de „La Juneco” — organo de la Vjetnama Junulara Federacio de Suda Vjetnamio, kaj de 1954 — redaktoro de „La Popolo” — ĉeforgano de la Vjetnama Laborista Partio. Ĉefa lia, nacilingva verko estas la poemo „Ho Chi Minh, la legendo de l' vero”.

Ekde 1957 — ĝenerala sekretario de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA). Tradukis esperanten „Tagkajero en prizono” de Ho Chi Minh kaj „Elektitaj poemoj” de To Huu. Redaktoro de la esperantlingva „Informado el Vjetnamio”.

* K-doĵ Dao Anh Kha kaj Nguyen Hai Trung, vjetnamaj poetoj kaj esperantistoj, estis oficialaj gastoj de la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj (vd. paĝojn 1, 2, 4, 10.)

Petite de la redakcio de „Bulgara Esperantisto”, k-do Dao Anh Kha diris ĉe la adiaŭo:

Saluton al Bulgario — la balkana bastiono de Esperanto!
Saluton al la frata fabela lando, nia ariero kaj nia estonto,
kiu inspiris nin per siaj rozoj kaj fortigis nin per siaj koroj!

Sofio, 12. VII. 1972

AL MIA „SANKTA MARIA”

Dediĉe al k-dino Maria Nanova,
ĉe la adiaŭo

Kial ne resti, resti, resti,
kiam disiĝi estas iom morti? Kial?
Se vokas nia alta celo al batal',
ne ploru, panjo, lasu min foresti.

Luliĝas niaj verdaj fruktĝardenoj kante,
kaj brilas niaj rozoj hejme, vin benante.
De l' fronto mi vin vidos klare, panjo,
el fajro mi vin aŭdos ĉiam, franjo.

Jam pano via igas min titane kreski.
Vi nepre fidu al la idoj, ĉar en batal'
finvenkos tiu, kiu ne kliniĝas al fatal'.
Ne ploru, panjo, lasu min foresti.

Kial ne resti, resti, resti. . .

Sofio, julio de 1972

ADIAŬA

Por vivo tiel bela,
por koro tiel hela,
por lando tiel fabela
mi mortos

fore

fidela.

Kjustendil, 1. VII. 1972





NGUYEN HAI TRUNG

Naskiĝis en Suda Vjetnamio je la 5-a de majo 1921. Partoprenis la batalon kontraŭ la japana faŝismo kaj la franca koloniismo. Pro revolucia agado devis forlasi la Hindoĉinan Altlernejon de Belartoj, kie li studis (pentrado kaj skulptado). Estis arestita kaj ĵetita en malliberejon unu jaron (1944). Post la liberigo partoprenis la Aŭgustan Revolucion (1945). Ĝis nun laboras kiel propagand-kleriga aktivulo de la Vjetnama Laborista Partio — poeto, romanisto, pentristo, esperantisto. Membro de l' Unio de Vjetnamaj Verkistoj.

En 1955 fariĝis laŭreato de literatura premio, donita de la Vjetnama Verkista kaj Artista Unio (pro la poemrakonto „Chu Hai Neo“).

Nguyen Hai Trung estas unu el la fondintoj de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (antaŭe — vicprezidanto, nun — komitatano).

Ĉe la adiaŭo k-do Nguyen Hai Trung direktis la jenajn vortojn al nia lando:

**Saluton al Bulgario — la paradiza lando de la rozoj,
al la heroa nacio kun multmiljara kulturo kaj revolucio,
lando de Orfeo, de Vasil Levski, de Ĥristo Botev kaj de Georgi Dimitrov!**

Sofio, 12. VII. 1972

ĤRISTO BOTEV

Dediĉe al T. B. G.

Ĉi-posttagmeze sen averti mi vin vizitas.

Vi hejme ne estas.

Nur via ŝtona busto intime akceptas min

kiel etan malproksiman fraĉjon

dum ripoztago

revenantan al la gepatra domo.

Kiel mielo la julia suno brilas,

trapasas la pinan altan foliaron,

eniras la fenestron,

dancante sur via kajero malfermita,

ŝajne estas poemo ne ankoraŭ finita.

Pilgrime mi paŝas ĉiun vian ĉambr-angulon,

relernas denove la grandajn lecionojn

pri justeco kaj libero.

En la korto

mi ĝoje kliniĝis

por trinki el la freŝega fonto,

ŝajne fluanta el via nobla, granda koro kaj animo,

por ke mia vivo, miaj versoj

estu baptitaj de vi kiel al eta lernanto via.

Morgaŭ mi revenos mian patrion Vjetnamion

por forpeli la jankiojn.

Mi certe estos pli forta dank' al de vi donitaj flugiloj.

1. VII. 1972



HO VI, BETULO!

*Al Nataŝa kaj ŝia patrino
renkontitaj en la transsiberia
vagonaro*

Betulo, ho vi, betulo!
Pro kia farbo tiel blankas via haŭto?
Pro kies kombo tiel verd-ondiĝas viaj haroj?
Pro kies kareso tiel sveltas via talio?
Ĉe tia mildeco kiel vi povas malestimi
la neĝan ŝtormon?

Vi estas tiel bela — kiel rusa fraŭlino.
Vi estas tiel simpla — kiel popolkanto.
Ĉie vi estas:

sur la abrupta montdeklivo,
ĉe la bela lago,
apud la blua rivero,
sur la vasta steparo.

Betulo!

Vi estas Nataŝa en „Milito kaj Paco“.
Vi estas Tatjana en la versoj de Puŝkin.
Vi estas Pelagija en „La patrino“.
Vi estas la heroa Zoja.

Neniel mi povas forgesi Nataŝa-n.
Neniel mi povas forgesi Tatjana-n.
Neniel mi povas forgesi „La patrino“.
Neniel mi povas forgesi Zoja-n.
Neniel mi povas forgesi Sovetan Rusion.

Neniam mi povas forgesi vin, betulo!

16. VI. 1962

EN LA ARBARO

de Ivan Draganov

Koljo, Asen, Peĉjo kaj Stefĉjo estis ĉiam unuanima kaj nedisigebla kompanio. Iun sabaton vespere ili denove kunvenis por decidi, kie pasigi la dimanĉon kaj kion ĝuste fari dum la tago.

Estis diversaj proponoj. Post mallonga diskuto ili plenkonsente decidis kaj esprimis sian ĝojon per laŭta krio:

— Al la arbaro! Al la arbaro! Jes, tien ni iru!

La sekvan tagon, frumatene, la kvaropo kolektigis sur la jam difinitan lokon. Ĉiu portis surdorse tornistron, plenan de ĉiuspecaj necesajoj. La gvidanto de la grupo estis Koljo — nur iom pli aĝa ol la ceteraj kaj pli sperta. Li ordonis:

— Nu, ek al la arbaro!

Kaj la kvaropo brue direktis sin tien.

Estis belega maja mateno. Ĉielo sen-nuba, vetero senventa. La humoro — bonega. Vigle marŝante, la knaboj interŝanĝis ŝercojn, kantis kaj preskaŭ ne rimarkis, kiam aperis antaŭ ili la arbaro. Koljo trovis belegan herbejon. Tie ili demetis siajn tornistrojn, faris malgrandan matenmanĝon, iom ripozis kaj poste ĉiu okupis sin laŭ sia inklino kaj deziro. Koljo komencis pluki florojn — la konvaloj jam estis ekfloritaj; Asen diris, ke li mem faros por si pafarkon kaj sagojn kaj poste trafos iun leporon aŭ birdon; Peĉjo deziris kapti erinacon; la ĉiama revo de Stef-



liberuloj. Antaŭ nia arestejo postenis maljuna urso. Estis klare, ke ĝi gardas nin. De tempo al tempo la urso ĵetis al ni severan rigardon. Kompreninte, ke speciala arbara tribunalo juĝos nin, ni maltrankvile atendis. Sur la vastan herbejon komencis kolektiĝi ĉiuj birdoj kaj bestoj de la arbaro. Meze de la herbejo staris tablo. Malantaŭ ĝi sidis granda maljunulo kun longa blanka barbo — la arbara reĝo. Ambaŭflanke de li — du belaj junulinoj-princinoj kun blujaj okuloj kaj blondaj haroj. Oni diris, ke unu el ili zorgas pri la floroj kaj la arboj, kaj la alia — pri la bestoj kaj la birdoj.

La reĝo ordonis al la urso konduki nin antaŭ la tribunalon. Ni iris tien kaj ekstaris humile. La proceso komenciĝis.

La unua el ni, kiun la arbara reĝo komencis pridemandi, estis la gvidanto de nia grupo — Koljo. Laŭ sia karaktero tre kuraĝa knabo, li nun tremis pro timo kaj preskaŭ ne kapablis paroli. Koljo ne povis klarigi, kial do li ŝirkolektis tiom multe da konvaloj kaj plenigis per ili sian tornistron, kial li neniigis multajn aliajn florojn kaj plantojn. Koljo nur silentis. Subite liaj okuloj komencis verŝi larmojn. Kion diri, kiamaniere senkulpigi sin, li tute ne sciis. Tamen Koljo bone rimarkis, ke en la okuloj de la arbara belulino, kiu zorgis pri la floroj, ankaŭ aperis larmoj pro la sence plukitaj kaj jam velkintaj konvaloj.

— He vi, Asen, — diris la arbara reĝo, — klarigu al ni kiom da arbejoj vi hakis por fari al vi pafarkon kaj sagojn! Ĉu vi scias, en daŭro de kiom da jaroj elkreskas unu arbedo? Ĉu vi scias tion? Kaj ĉu almenaŭ unu arbedon vi mem plantis ĝis nun? Nu, respondu al ni!

Asen silentis.

Venis la vico de Peĉjo. La arbara reĝo severe demandis lin:

— Ĉu vi estas lernanto?

Ĉjo estis kapti kardelon. Li muntis sian ret-kaptilon sur oportunan lokon. Sub ĝin li ŝutis kelkajn gren-grajnojn. Poste, kaŝinte sin malantaŭ unu el la arboj, li komencis observi la kaptilon. Baldaŭ alflugis multaj kardeloj. Pro granda emocio la koro de Stefĉjo batis forte. Streĉe kaj atente rigardante, li atendis la momenton, kiam iu el la birdoj enflugos la reton. Jen la plej kuraĝa, verŝajne la plej juna kaj ne tiom sperta, ensaltis sub la reton kaj komencis beki grajnojn. Stefĉjo tuj ek-tiris la ŝnuron kaj la reto falante kovris la birdeton. Ĝi jam estis lia kaptito. Stefĉjo ege ĝojis. Li tuj fermis ĝin en specialan kaĝon.

Tute nerimarkite venis la tagmezo. La amikoj denove kolektiĝis kaj faris komunan tagmanĝon. Ĉiuj sentis sin feliĉaj, realiginte siajn revojn. Post mallonga ripozo, ili amuzis sin per kantoj kaj ludoj. Antaŭ la vesperiĝo la kvaropo ekiris hejmen.

— Kiamaniere okazis tio, mi ne povis kompreni, — rakontis poste Stefĉjo. — Ni ĉiuj, la tuta kompanio, estis kolektiĝintaj sur unu lokon, sed tiun ĉi fojon, tre surprizitaj, ni staris kiel kaptitoj en granda kaĝo, simile al mal-



— Jes, — respondis Peĉjo kaj klinis la kapon.

— Ĉu la erinaco estas utila besto? Rakontu al ni per kio ĝi nutras sin!

Peĉjo kun tremanta voĉo rakontis ĉion pri la erinaco.

— Bone, — diris la arbara reĝo. — Sciante tion, kial do vi kaptis la malfeliĉan beston? Verŝajne por turmenti kaj poste mortigi ĝin?

— Kaj vi, knabo, — li turnis sin al mi, — rakontu, kial do vi kaptis tiun ĉarman kaj belvoĉan birdeton! Ĉu vi ne scias, ke la birdoj estas helpantoj kaj gardistoj de la arbaro? Ĉu vi ne scias, ke birdoj ornamas la tutan arbaron kaj ke sen birdoj neniam sonos melodiaj kantoj en ĝi?

Pro honto mi silentis kun klinita kapo.

Tiam la arbara reĝo ekstaris surpiede kaj diris:

— Vi ĉiuj meritas pli grandan punon, sed pro tio, ke vi estas ankoraŭ tre junaj, mi punos vin nur per tritaga malliberigo en la arbara malliberejo.

Aŭdinte tion, mi komencis plorsingulti kaj diris:

— Mia panjo kaj mia paĉjo ploros multe, se mi ne revenos hejmen. Pardonu al ni, arbara reĝo, kaj liberigu nin, ni petegas vin! Indulgu nin! Ni ĉiam gardos la arbaron!

Miaj amikoj ankaŭ plorsingultante petis la reĝon pardoni al ni kaj faris la saman promeson.

Sed la arbara reĝo severe diris:

— Kial do vi ne pensis antaŭe pri tio? Kial vi forgesis, ke la panjo de la birdeto, kiun vi kaptis, ankaŭ plotos?

Kaj li ordonis:

— Forkonduku ilin kaj fermu ilin en la malliberejon!

— — — — —

Vekiginte, Stefĉjo time malfermis la okulojn, sed ankoraŭ ploris singultante. Apud la lito staris lia patro. Li metis manon sur lian frunton.

Komence Stefĉjo ne povis kompreni, kie li troviĝas kaj kio okazas. Poste li iom post iom trankviligis, kompreninte ke li nur travivis teruran sonĝon. Kaj li rakontis al sia patro, kie kaj kiel li kun siaj amikoj pasigis la hieraŭan tagon kaj kion li sonĝis dormante.

Poste ili ambaŭ — la patro kaj la filo — iris en la alian ĉambron, kie estis la kaĝo kur la kaptita kardelo. Stefĉjo malfermis la fenestron de la ĉambro kaj la pordeton de la kaĝo kaj diris al la birdeto:

— Nu, vi estas libera! Pardonu al mi! Mi promesas neniam plu kapti birdetojn.

La kardelo rapide saltis el la kaĝo, tuj forflugis tra la fenestro, ekstaris sur branĉon de la proksima pomjuo kaj komencis ĝoje kanti — ĝi kvazaŭ dankis al Stefĉjo.

En Sofio la 2-an de junio ĉ. j. forpasis en
sia 56-jara aĝo

ALEKSANDRA KRUMOVA KJURKĈIEVA

Longjara membro de la Poŝtista E-Societo „Heroldo“ en Sofio kaj kelkajn jarojn membro de E-Societo „Ĥristo Botev“ ĉe la Ministerio de la Transporto.

Niajn kondolencojn al ŝiaj proksimuloj!

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÂLEV

Redakta komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Venelin MITEV, Stefka ĤRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Stančo Marinov — *Loveč*, Zavod 2 na zavod „Balkan“ (24-jara — kun ĉi pri ĉi). Respondo certa.

Hungario

Reigl Endre — *Szeged*, Tarjantelep 315. l. 6 (25-jara ĵurnalisto — kun ĉi pri ĉi, bk, k. a.).

Kvar hungaraj mezlernejaj lernantinoj tre volas korespondi kun junaj bulgaraj esperantistoj. Ili havas komun-

an abreson: *Eger*, Kossuth u. 8. Jen la nomoj: Benei Katalin, Csöke Jolan, Kiss Katalin, Tari Judit.

Du ĝemelinoj (vidu la foton): Julian — kaj Rozalia Szatmari — *Dunavarsany* I, Baross utca 10, Pest megye (25-jara oficistinoj — pri literaturo, filmoj, muziko k. a. kun ĉi).

Agnes Ampovits — *Nagyér*, Szabadsag 57 (24-jara ĵuristino).

Peter Czirbus — *Nagyér*, Bocskai u.

6 (28-jara brigadestro).

Johano Hudak — *Nagyér*, Szabadsag 19 (48-jara laboranto).

Gyöngyi Kádár — *Nagyér*, Damjanich 21 (17-jara studentino).

Julianne Növér — *Nagyér*, Szabadsag 6 (18-jara kudristino).

Iren Szantai — *Nagyér*, Virag u. 12 (13-jara lernantino).

Rozalio Toth — *Nagyér*, Rakoczi u. 44 (21-jara oficistino).

Pollando

Piotr Adolph — *Jastrebja Gora*, str. Rozevska 11, *Gdansk*. (28-jara teknikisto — kun ĉi pri sporto, turismo, geografio, tekniko, aŭtomobila mastrumo k. a.).

Wanda kaj Edward Wojtakowski — *Wroclaw*-2, poŝkesto 312 (juna geedzaro — kun sovetaĵ samideanoj pri esperantaĵoj, diapozitivoj, reciprokaj vizitoj k. a.).

Kubnyk Roman, *Czestohowa*, ul. Dobrzynska 128 (20-jara lernanto en aŭtomobila teknikumo — kun ĉi pri pm, bk kaj kovertoj pri temoj „Esperanto“ kaj „Ruĝa Kruco“).

Ruszard Majdra — *Wroclaw*, pl. Pereca 4/1 (23-jara — kun ĉi pri muziko, mekaniko k. a.).

Bak Roman — *Choczni* 541, pow. Wodo-

wice, woj. *Krakow* (19-jara — kun ĉi pri mara floto kaj geografio, bk, sonpoŝtkartoj).

Wasik Rozalia — *Maezki*, ul. *Krakowska* 8/12, pow. *Bedzin*, woj. *Katowice* (22-jara instruistino — kun gebulgaroj pri muziko, turismo k. a.).

Andreo Wozniakiewicz — *Krakow*, ul. *Zaleskiego* 6/8 (21-jara studento — kun bulgaroj pri sporto k. a.).

Celina Magierowska — *Sieściechomice* 34 p-ta *Koperniki*, pow. *Nysa* (17-jara — kun ĉi pri fotoj, lit-ro, muziko, vojaĝoj — en Esperanto, pola, rusa, franca).

Informojn en Esperanto pri turismaj, kulturaj kaj arkitekturaj valoroj de Malsupra Sile, zio kaj *Wroclaw* sendas Dolnoślonski Osrodek, Informacji Turystycznej, *Wroclaw*, ul. *Kollataja* 31.

Sovetunio

V. Andreev — abonkesto 98, *Ĉeljabinsk* Centro, 454 000 (juna inĝeniero — kun Francio, GFR, Usono).

Leili Enop — *Kohila*, Lepaluku 12, 203 420 Rapla raj., Estonio (18-jara lernantino — kun ĉi pri muziko, naturo, bk).

Ursula Vestholm — *Tööstuse* 15-3, 203 420 Rapla raj., Estonio (18-jara lernantino — kun ĉi pri literaturo, muziko, bk).

Maire Lember — *Kohila*, Tule Torje 3, 203 420 Rapla raj., Estonio (17-jara lernantino — kun ĉi pri teatro, naturo, muziko).

Merike Kaeli — *Seli SJK*, 203 512 Rapla raj., Estonio (17-jara — kun ĉi pri literaturo, lingvoj, muziko, bk).

Notu novan adreson:

Anja Vojnaroviĉ — 353 860, *Priazovska* poŝta, Primorsko — Aĥtarskij rajon, *Krasnodarskij* kraj.

Danuta Balčiunaite — 233 031 *Kaunas*, Zuvinto g. 6-1 (19-jara studentino en Politekniko — kun ĉi pri muziko, filmoj, bk).

Grabėjite Grajina — *Vilnius*-9, str. *Basanavičius* 26-2 (21-jara studentino de kemio — kun bulgaraj gestudentoj pri studenta vivo kaj E-ago).

Jhozas Skripkauskas — *Turu*, km, *Salantai*, *Kretingos* raj., Litovio (kun ĉi pri ĉi).

20 — 25-jaraĵ membroj de E-klubo — kun ĉi pri ĉi. Komuna adreso: Esperanto-Klubo, *Ĉeljabinsk*, p. k. 98, 454 000 (por V. Andreev).

Jolanta Valaikaite — 235 800 *Klaipeda*, *Taikos* pr. 16-326, Litovio (18-jara studentino en muzika lernejo — piano — pri arto, sondiskoj, bk, pm).

